

# EL POPOLO ĈINIO

中國新道


5

1998

ISSN 0032-4361



**760 milionoj da ĉinoj en balotado**  
**Sanprotekto de maljunuloj**  
*Ĉarmo de naciaj kantoj kaj dancoj*



Sen titolo

Foto de ZHAI BIAN

## INTER NI

*Ĝojiga novaĵo: El Popola Ĉinio legeblas en la Interreto ekde la 3-a numero de 1998. Estas tre bonvenaj viaj vizitoj al nia hejmpaĝo (<http://www.china.org.cn>) kaj reagoj. Al tiu hejmpaĝo apartenas kelkaj ĉinaj gazetoj, inter kiuj nur El Popola Ĉinio estas Esperanta.*

*En la pasinta jaro ni publikigis anoncon "Estas bonvenaj represoj kaj tradukoj el El Popola Ĉinio". Reage al tio iuj legantoj represigis niajn artikolojn "Akupunkturo kaj kupra homo", "Nova politiko pri naskolimigo de Ĉinio", "Gajaj kanceruloj"... en gazetoj de Francio, Nepalo, Japanio,*

*Ĉeĥio kaj Hungario. Ĉeĥa leganto Drahomir KOČVARA represigis tri artikolojn de EPC en ĉeĥa gazeto. Lia letero diras: "Tiuj artikoloj pri kuracaj metodoj interesas nian publikon. Neniam ellasu artikolojn pri ĉinaj kuracaj metodoj, ĉar en Eŭropo ili estas malmulte aŭ preskaŭ tute ne konataj."*

*Ni opinias, ke la represado en tiuj gazetoj utilas al diskonigo de Esperanto kaj ankaŭ aferoj pri Ĉinio. Ni esprimas koran dankon al ĉiuj, kiuj faris kaj faros tiujn laborojn, sendis kaj sendos al ni la specimenojn kun niaj artikoloj.*

**La Red.**

# El Popola Ĉinio



Vivantaj modeste kaj laborantaj peneme en malbonaj kondiĉoj, petrolistoj akiris grandan estimon per sia sinofere-mo.


Foto de Wei Zhi

## EL POPOLA ĈINIO

Monata gazeto, eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo  
 Redaktata de Redakcio de "El Popola Ĉinio"  
 Distribuata de Distribua Fako de "El Popola Ĉinio"  
 Direktoro: Hou Zhiping  
 Adreso: P. O. Kesto 77, Beijing 100037, Ĉinio  
 Telefono kaj telefakso: +86-10-6832 1808  
 Hejmpaĝo: <<http://www.china.org.cn>>

# EN LA VOJO

- |  |   |
|--|---|
| <p>2 <b>INTER NI</b><br/>                 4 <b>JUNULARO:</b><br/>                 Modeloj de modernaj junuloj<br/>                 6 Ĉarmo de naciaj kantoj kaj dancoj<br/>                 8 <b>EKONOMIE:</b><br/>                 Reformado en la ŝtataj entreprenoj; Sin liberigi el la kateno de unuopa entreprenado; Kurantaj aferoj<br/>                 10 <b>ĈINA KULTURO:</b><br/>                 Aludoj en la ĉina lingvo<br/>                 12 Memore al Ivo Lapenna, la kreinto de la moderna Esperanto-Movado<br/>                 14 <b>ORIGINALE VERKITAJ:</b><br/>                 Du poemoj<br/>                 15 <b>SUR NIA LIBROBRETO:</b><br/>                 Libroj eldonitaj de Ĉina Esperanto-Eldonejo (1994-1996)<br/>                 16 <b>POR KOMENCANTOJ:</b><br/>                 Aĉeto de kato<br/>                 17 <b>ESP-NOVAĴOJ</b><br/>                 Akrobatika palaco<br/>                 20 Manĝetoj de Shaxian-gubernio<br/>                 21 <b>EN ĈINAJ URBETOJ:</b><br/>                 Plekti novan vivon per bambuoj</p> | <p>24 <b>ORDINARAJ ĈINOJ:</b><br/>                 Flegantoj de novnaskitoj<br/>                 26 Belaj pejzaĝoj de Jiuzhaigou<br/>                 28 <b>LAŬ LA SILKA VOJO:</b><br/>                 Petrolurbo en dezerto<br/>                 36 Defianto de la tabua zono de la vivo<br/>                 38 760 milionoj da ĉinoj en balotado<br/>                 40 Efika metodo kontraŭ falso<br/>                 41 Antikvaj pagodoj en Longyan<br/>                 42 Ĉe la Malpermesita Urbo<br/>                 44 Gazeto "Malgranda Mastro" kaj ĝiaj malgrandaj mastroj<br/>                 46 <b>FACETOJ DE LA ĈINA SOCIO:</b><br/>                 Iom pri akciuloj kaj akcia merkato de Ĉinio<br/>                 48 <b>EL ĈINAJ GAZETOJ</b><br/>                 50 <b>POR VIA SANO:</b><br/>                 Sanprotekto de maljunuloj<br/>                 51 <b>ĈINAJ METIARTAJĴOJ:</b><br/>                 Suzhou-a brodaĵo: kato kaj manto<br/>                 2 Sen titolo<br/> <b>SUR LA DORSKOVRILO:</b><br/>                 [FOTOJ FARITAJ DE E-ISTOJ]<br/>                 Urbeto Moret sur Loing apud Parizo; Kastelo Herberstein</p> |
|--|---|



## Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

- |                            |                     |
|----------------------------|---------------------|
| 1. Guizhou (p. 8)          | 4. Xinxiang (p. 25) |
| 2. Ŝanhajo (p. 44)         | 5. Hefei (p. 25)    |
| 3. Fujian-provinco (p. 21) | 6. Shaoshan (p. 48) |



# Modeloj de modernaj junuloj

de WANG HANPING

*En malsamaj periodoj, la junuloj havas malsamajn aspirojn. Ekz. en Ĉinio, en la 50-aj jaroj, junuloj strebis por kiel eble plej multe kontribui al la patrolando; en la 60-aj, ili akcentis tutkoran servadon al la popolanoj; en la 80-aj, junaj ĉinoj pli emfazis sinklerigon por fariĝi kapablaj fakuloj. En ĉiuj tiuj periodoj aperis multaj modeloj de junuloj kun epokaj karakterizaĵoj. Ĉe la jarcenta ŝanĝo, pro rapida socia evoluo, la pensmanieroj de ĉinaj junuloj kaj iliaj konceptoj pri valoro multe ŝanĝiĝis. Aperis inter ili ankaŭ granda nombro da novaj modeloj lernindaj por junularo. En la lastaj jaroj Ĉinio preskaŭ ĉiujare elektis siajn 10 elstarajn junulojn. Ni prezentas kelkajn el ili, ke vi konu la aspiron de la nunaj ĉinaj junuloj kaj ilian koncepton pri valoro.*

Yu Tao

**H**UMURA dialogo estas speco de spritaĵo tre ŝatata de multaj ĉinoj. Feng Gong, fama aktoro de tiu arto, ofte aperas sur scenejoj kaj en televidaj programeroj, alportante grandan ĝojon al milionoj da spektantoj. Li tre frue famiĝis kaj gajnis multajn premiojn, el kiuj li plej alte taksas la titolon “Elstara Junulo de Ĉinio”, kiun li ricevis en 1997. Lia elekto tamen rezultis ne nur el lia lerteco en prezentado de humura dialogo, sed ĉefe el liaj amo kaj devokonscio al la popolo kaj patrolando.

En la merkata ekonomio de la nuna Ĉinio famuloj kiel Feng Gong tre facile riĉiĝas. Tamen li prezentis multfoje por filantropio kaj ofte iris prezenti al la ordinarnaj popolanoj kaj laborantoj en landlimaj regionoj, petrolkampoj



Aktoro de humura dialogo Feng Gong (maldekstre) en prezentado

kaj minejoj. Foje en Tibeto li sursceniĝis eĉ kun forta febro. Li ankaŭ monhelpis regionojn trafitaĵajn de naturaj katastrofoj kaj lernantojn de malriĉaj familioj. Kun

aliaj li fondis piedpilkan teamon el famaj ludistoj. En kelkaj jaroj la teamo kolektis 10 milionojn da juanoj por la Ĉina Sporta Fonduso. Li diris: “Mi pretas fari ĉion,



kion la popolo bezonas.” Lia bonkoreco kaj amo al la popolo kortuŝis multajn junulojn.

En 1990 la Ĉina Junulara Federacio kaj la Ĉina Disvolvita Fonduso de Junuloj kaj Knaboj kun gravaj amaskomunikiloj en Pekino kune lanĉis elektadon de “10 elstaraj junuloj de Ĉinio”. La kandidatoj devis esti ĉinaj civitanoj 18-39-jaraj, kiuj havas eldo. Inter la elektitaj “10 elstaraj junuloj” estis fama *vejĉi*-isto, kiu multfoje venkis japanajn *vejĉi*-istojn, kaj estis ankaŭ tiuj, kiuj havas grandajn atingojn sur ordinaraj postenoj, kiaj agronomo, estro de mezlernejo, fakulo pri medicino, direktoro de kompanio, telefonistino... Ĉu antaŭe ili estis fame konataj aŭ ne, post la elekto ili ĉiuj kaptis la atenton de milionoj da homoj. Fakte la celo de la elekto estas honoro kaj diskonigi la elstarajn junulojn, por ke la aliaj lernu de ili. Pli kaj pli multaj donis atenton al la elekto de “10 elstaraj junuloj”. En la 3-a elekto en 1992 oni ricevis ĉ. 7 milionojn da balotiloj, kio malfaciligis la statistikon. Pro tio oni ŝanĝis la elekta manieron. De la 4-a elekto funkcias juĝ-komisiono el kelkdek personoj de diversaj rondoj. Ĝi elektas 10 elstarajn junulojn surbaze de la rekomendoj de lokaj junularaj federacioj. La elektitaj junuloj havas pli vastan reprezentantecon pri regionoj, fakoj, nacioj kaj seksoj.

En la pasintaj 8 jaroj elekto 80 elstaraj junuloj, kiuj ĉiuj diligente laboris sur sia posteno. Tradicie ĉinoj alte taksas diligentecon kaj laboremon. En la 50-aj jaroj, kiam ĵus fondiĝis la Ĉina Popola Respubliko, aperis multaj junaj labor-modeloj. Tiam la ĉinaj junuloj rigardis honoro “diligente labori por la patrolando”. Lei Feng estis multe konata jam en la 60-aj jaroj en Ĉinio. Li bone laboris kaj entuziasme servis al la socio. Pro akcidento dum laboro



Arbaristo Sun Junfu (maldekstre)

li mortis 22-jara. Nun lia nomo estas sinonimo de nobleco kaj sindonemo. Liaj travivaĵoj inspiris ĉinajn junulojn de pluraj generacioj.

Fine de la 70-aj jaroj Ĉinio malfermis la pordon. Alilandaj konceptoj pri valoro influis ĉinajn junulojn, inter kiuj okazis diskuto: Ĉu daŭre diligente labori konservante la malnovajn pensojn aŭ fariĝi talentulo kun kreivo; ĉu strebi nur por persona valoro aŭ zorgi ankaŭ pri la socia evoluo. Fakte, la socio bezonas diversajn junajn kapablulojn. Tial multaj junuloj klopodas altigi siajn klerecon kaj laborkapablon.

Kiel kunligi la tradiciajn diligentecon kaj sindonemon kun la modernaj kreivo kaj renovigo? Ĝustan vojon montras la elstaraj junuloj, kiuj per sia solida laboro efektivas sian personan valoron kaj samtempe kontribuas al la progreso de la homaro kaj la disvolviĝo de la socio. En 1996 Sun Junfu (Sun Ĝjunfu) elekto 10 elstaraj junuloj”. Li estas forstokulturisto en nordorienta Ĉinio. Multjare li kun sia edzino loĝas sur monto. En la pasintaj 10 jaroj ili plantis 480 000 arbojn kun areo de 100 hektaroj.

Nuntempaj ĉinaj junuloj deziras fariĝi homoj kun tradicia diligenteco, alta klereco, modernaj scioj kaj forta kreivo. Inter la elstaraj junuloj estas sciencistoj kaj entreprenistoj. Prof. Chen Zhangliang, ricevinto de la premio Gaved Hussain de Unesko por Junaj Sciencistoj, (ni raportis pri li en la 5-a numero de 1992) estas reprezentanto de junaj sciencistoj, kiuj havas multajn grandajn atingojn en la scienca esplorado. En la merkata ekonomio junaj entreprenistoj antaŭenpuŝas la evoluojn de loka kaj ŝtata ekonomio. Jian Chunlin (Ĝjan Ĉunlin), estro de farmejo en Hainan-provinco, sukcese transformis farmejon kun granda pasivo en modernan akcian entreprenon en nur kvar jaroj.

Ĉiujare la elekto de “10 elstaraj junuloj” daŭras 6 monatojn kaj la elektitaj junuloj aperas en gravaj amaskomunikiloj, kiaj la Ĉina Centra Televido... Ili ankaŭ prelegas en multaj lokoj. Nun en multaj lokoj kaj rondoj okazas simila elekto. Fakte, la elekto de “10 elstaraj junuloj” influas ne nur la junularon sed ankaŭ la tutan socion. ■

CHUAN BIAN:

# Ĉarmo de naciaj kantoj kaj dancoj

**E**N Bairin Youqi, Interna Mongolio, la temperaturo en vintro ofte estas 8°C sub la nulo, tamen spekti prezentadon de diversnaciaj aktoroj en frosta vento sur la stepo estis la unua fojo por la mongolaj paŝtistoj. Informiĝinte, ke famaj aktoroj de diversaj nacioj donos prezentadon, la lokaj paŝtistoj kaj tiuj loĝantaj eĉ dekojn da km fore torentis aŭ sur ĉevalo aŭ sur ĉevalĉaro aŭ piede al la loko por ĝui la prezentadon. Menciindas, ke en tia frosta vintro la aktoroj portis maldikajn vestojn por kon-

## La danco "Printempo"



formigi sin al la prezentado.

Fakte, tio estis nur ordinara prezentado de la Centra Nacia Ensemblo el Pekino.

En 1952 oni sin preparis por starigi la nomitan ensemblon, kiu portis komence alian nomon, t.e. Artistan Trupon de la Centra Nacia Instituto. Dum la pasintaj pli ol 45 jaroj ĝi donis prezentadon en diversaj lokoj de nacimalplimultoj. La aktoroj tion faris ĉiam energioplene por nacimalplimultoj en kiu ajn loko kaj en kiu ajn vetero. Kelkfoje ili veturis plurajn tagojn por prezenti programerojn nur al dekelkaj kaj eĉ kelkaj spektantoj. Ilia faro ege kortsuŝis diversnaciajn popolanojn. Oni nomas la ensemblon sendito por naciaj unuiĝo kaj amikeco.

Sub la slogano "Iri al regionoj de nacimalplimultoj kaj al aktuala vivo" ĉiuj artistoj de la ensemblo iris al malproksimaj landlimaj vilaĝoj por vivi, lerni kaj prezenti programerojn. Dank' al tio, ili ne nur spertis la lokajn morojn, sed ankaŭ lernis eminentajn tradiciajn artojn. Kolektante kaj reordigante la tradiciajn kantojn kaj dancojn de nacimalplimultoj, ili senĉese akceptis elstar-



ajn artistojn de diversaj nacimalplimultoj, kiaj flutisto el saniavilaĝo, ludisto de liuto en formo de ĉevalkapo el Interna Mongolio, kantisto-tamburisto sur mjaŭ-a monto, tibet-nacia artisto ĉe la piedo de la neĝa monto Blanka Ĉevalo. Sur tiu solida bazo la ensemblo fondiĝis en 1954.

Vivante en nacimalplimultaj regionoj, la artistoj kreis multajn elstarajn kantojn kaj dancojn. La ĥoro "Gastoj el malproksimaj lokoj, restu ĉi tie", adaptaĵo de popolkanto kun profunda sento de sani-oj, rapide cirkulis en kaj eksterlande. En 1956 ĝi gajnis la oran medalon en la Sesa Internacia Festivalo de Junuloj kaj fariĝis peco el la repertuaro de la ensemblo.

Ankaŭ la tibeta danco "Artisto migranta sur stepo", la instrumenta muziko "Danmuziko de jaŭ-oj" kaj aliaj programeroj kreitaj en



La danco "Artisto migranta sur stepo"

la praktiko estas vaste ŝatataj. Dum la pasintaj pli ol 45 jaroj la ensemblo kreis kaj prezentis pli ol mil programerojn, eltrovis kaj kulturis arojn da famaj elstaraj kantistoj, dancistoj kaj instrumentoludistoj.

La ĉinaj nacimalplimulto renomiĝas per sia lerteco en kantado kaj dancado, per kiuj ili esprimas sian senton kaj akcelas reciprokan komprenon. Dum la laboro kaj en la ĉiutaga vivo ili komponis muzikon kaj dancon, kiuj spegulas de diversaj flankoj iliajn historion, sorton, morojn, kutimojn, pens-manieron kaj konon pri beleco.

Heredante tradiciajn naciajn kantojn kaj dancojn, la ensemblo senĉese riĉiĝas ilin per epoka trajto por kontentigi la bezonon de spektantoj.

En la ensemblo laboras pli ol 300 aktoroj el 36 nacioj. Preskaŭ

ili ĉiuj estas eminentaj. Dum interŝanĝo de artoj ili ne nur perfektigas sian lertecon en kantado kaj dancado de sia propra nacio, sed ankaŭ ĉerpas kvintesencon de artoj de aliaj nacioj. Ekz., Yang Liping, fama baj-a dancistino, faris sensacion en la dancista rondo per la tradicia taj-a danco "Spirito de pavo". La de ŝi kreitaj dancoj "Lunlumo", "Du arboj" kaj "Fajro" kun naciaj trajtoj ĉarmas per moderneco.

Por festi sian 45-jariĝon, la ensemblo okazigis ĉe la fino de 1997 vesperon de naciaj kantoj kaj dancoj. En ĝi la aktoroj, ĉu veteranaj ĉu junaj, ĉiuj altiris la atenton de la spektantoj per sia bela prezentado. Kvin el la ses dancoj prezentitaj en ĝi estis kreitaj en 1997. La diversnacia kolektiva danco "Gaja tero" temas, ke diversaj nacioj gaje kolektiĝas kaj sopiras al bela perspektivo;

la ji-a triopa danco "Rivereto fluanta" montras ji-ajn morojn per moderna danc-maniero; la taj-a kolektiva danco "Bona deziro" manifestas per pavado la sopiron al la mondopaco; la mongola kolektiva danco "Senlima stepo" montras figurojn de novgeneraciaj paŝtistoj sur stepo kiel agloj flugantaj kaj ĉevaloj galopantaj. Precipe la 15-nacia tambura unisono "Animo de tamburoj" akompanata de aliaj instrumentoj prezentas la spiriton de la ĉina nacio de antikveco ĝis nuntempo. La vespero ĝuigis al la spektantoj belajn naciajn muzikon, kantojn kaj dancojn.

Dum la pasintaj pli ol 45 jaroj la ensemblo vizitis ĉ. cent landojn kaj regionojn, alportante al iliaj popoloj ne nur elstarajn naciajn kantojn kaj dancojn de Ĉinio, sed ankaŭ amikecon de la ĉina popolo. ■




# Reformado en la ŝtataj entreprenoj

de ZONG HE

**L**A ĉinaj ŝtataj entreprenoj nun spertas profundan reformadon kun transiro de la planizita ekonomio al la socialisma merkata.

Ĉinio havas 68 000 ŝtatajn industriajn entreprenojn, el kiuj 53 000 estas malgrandaj kaj la aliaj — grandaj kaj mezgrandaj. Ili estas gravaj, kvankam malmultaj. La impostoj kaj profitoj donitaj de ili al la ŝtato konsistigas ĉ. 65% de tiuj de la industriaj entreprenoj de Ĉinio. Oni povas diri, ke la ŝtataj entreprenoj ludas gravan rolon por la disvolviĝo de la nacia ekonomio kaj sukceso de la reformado.

La ŝtataj entreprenoj de Ĉinio alfrontas malfacilojn en reformado de la ekonomia strukturo. La kaŭzoj kuŝas en tio: Unue, la administra sistemo de la entreprenoj kaj la ideologio de la entreprenistoj ne povas rapide adaptiĝi al la disvolviĝo de merkata ekonomio, nemalmultaj entreprenistoj malalte taksas la merkatan komercadon, ne organizas produktadon laŭ bezono de la merkato kaj ankoraŭ ne liberigas sin el la kutimo plenumi taskojn difinitajn de la ŝtato, kiu aĉetis ĉiujn iliajn produktaĵojn siatempe. Due, iliaj produktaĵoj ne konformas al la bezono de la merkato, kio kondukas al la malleviĝo de produktado kaj entreprenado. Trie, la ŝtataj entreprenoj estas multe ŝarĝitaj, precipe la malnovaj entreprenoj,



En laborejo de makromolekula kompanio investita de Korea Respubliko

kiuj rolas kiel malgranda socio kun infanĝardeno, elementa lernejo, mezlernejo, kinejo, klubo kaj eĉ hospitalo. La entreprenoj respondecas pri ĉiuj bezonoj de siaj laborantoj en la vivo. Ili devas vivteni ankaŭ la malgrandajn infanojn de siaj laborantoj post ties morto, kiam la strukturo de socia garantio estas ne kompletigita. Nun multaj ŝtataj entreprenoj dronis en dilemo pro malvenko en la konkurenco kun entreprenoj vilaĝaj kaj tiuj investitaj de alia lando. Krome, en tiuj entreprenoj estas multaj superflujaj laborantoj. En la tuta lando la nombro de superflujaj laborantoj atingis 30 milionojn. Ankaŭ tio depresiigas la ŝtatajn entreprenojn.

Post kelkjara malfacila reformado la ĉina registaro kaj ŝtataj entreprenoj ekhavis komunan konon: reformado estas unika

elirejo por la ŝtataj entreprenoj sin liberigi el dilemo. Pro tio la ŝtato ellaboris konvenajn politikojn kun la celo starigi entreprenan sistemon bezonatan de la merkata ekonomio: Koncerne grandajn kaj mezgrandajn ŝtatajn entreprenojn, kun kapitalo kiel ligilo organizi ilin en korporaciojn interregionajn, interentreprenajn, interposedsistemajn kaj interlandajn. Koncerne malgrandajn ŝtatajn entreprenojn, fari al ili reorganizon, unuigon, anekson, luigon, bankrotigon, laŭkontraktan produktadon, akcian kooperadon, vendon kaj aliajn. Laŭ la plano necesas fari ĉion eblan por liberigi grandajn kaj mezgrandajn ŝtatajn entreprenojn el dilemo en la daŭro de ĉ. 3 jaroj, tiel ke en 2000 en tiuj entreprenoj fundamente estos starigita la sistemo de moderna entreprenado. ■

# Sin liberigi el la kateno de unuopa entreprenado

de JI PING

**M**INACATE de milito, Ĉinio fondis nombron da entreprenoj por militaj aferoj en landlimaj regionoj en la 60-aj jaroj. La Guizhou-a Vagona Fabriko estis unu el ili. Tiam la ŝtato donis al ĝi la taskon ripari ĉiujare 2 000 kargovagonojn. Katenite de la planizita ekonomio kaj ricevinte limigitan ŝtatan subvencion, ĝis 1985 la fabriko deficitis entute ok milionojn da juanoj. Multaj laboristoj volis forlasi la laboron kaj 3/4 de la 400 teknikistoj adiaŭis la fabrikon.

Praktikante la sistemon de

merkata ekonomio, la ŝtato ne subvencias la entreprenon. Kion do ĉi tiu faras por plua ekzistado?

Ekde 1986 la fabriko alprenis tri metodojn: Unue, la fabriko sin okupis je riparado de kargovagonoj antaŭe, sed nun ĝi ne nur riparas ilin, sed ankaŭ produktas vagonarojn, ŝtal-ingotojn kaj risortojn por diversaj lokomotivoj kaj aŭtoj. Due, ĝi decideme alprenis taŭgajn rimedojn por sin liberigi el la kateno de unuopa entreprenado kaj, utiligante riĉfontojn de la provinco kaj proksimaj lokoj, starigis fabrikojn de

litkusenoj. Trie, fondiĝis 14 entreprenoj, investitaj de la provinco kaj komercistoj usonaj, aŭstraliaj kaj francaj kaj la vagona fabriko havas akciojn de 12 el ili. Tiuj malgrandaj fabrikoj liveras 26 specojn de produktaĵoj, el kiuj multaj vendiĝas en aliaj landoj.

En la jaroj de 1990 ĝis 1997 preskaŭ ĉiuj ekonomiaj normoj de la fabriko 4-6-obliĝis kaj la enspezo de ĝiaj laborantoj 3-obliĝis. Leviĝis ankaŭ la interezoj de ĝiaj kapitaloj, pokapa profito kaj aliaj normoj. ■

## KURANTAJ AFEROJ

● Ĝis la fino de novembro 1997 la ĉina registaro sankciis entute pli ol 300 000 entreprenojn investitajn de aliaj landoj kaj utiligis eksterlandajn kapitalojn de 200 miliardoj da usonaj dolaroj. En la pasintaj sinsekvaj 4 jaroj Ĉinio estis lando, kiu utiligis plej multe da eksterlandaj kapitaloj, post Usono.

● En Sichuan-provinco, Ĉinio, estis finkonstruita granda ultrasona ventotunelo. Ĝia korpo estas 66 m longa kaj 33 m larĝa, kun sekco de 2.4x2.4 m. La tunelo estas nemankigebla por elfariavangardajn kosmonaŭtikajn kaj aviadan aparatojn.

● La unua granda marfunda karbominejo de Ĉinio estas konstruita sur marfundo ĉe Longkou, Shandong-provinco. Lakarbominejo estas konsistiga parto de la novgeneracia karba basenode Longkou, kiu areos 150 kvadratajn kilometrojn, kun karbotavolo 10 m dika kaj rezervokvanto de miliardo da tunoj da karbo.



En laborejo de interregiona akcia grupo-entrepreno

# Aludoj en la ĉina lingvo

de ZHANG QICHENG

**E**N la ĉina lingvo aludoj ludas specialan rolon kaj indas esti traktataj. Kio do estas aludo? Laŭ la ĉinlingva vortaro, aludo estas vorto uzata en poezio aŭ alispecaj verkaĵoj, kiu devenas el klasikaĵoj aŭ historiaj eventoj por esprimi ian ideon. Laŭ tiu klarigo, ŝajnas al mi, ke aludoj troviĝas ne nur en la ĉina, sed ankaŭ en la okcidentaj lingvoj. Ekz., la nomo Prometeo, la esprimoj “nodo de Gordio” kaj “kalkano de Aĥilo”, kiuj devenas el la helena mitologio, kaj la personaj nomoj “Romeo kaj Julieta” el dramo de Ŝekspiro povas esti rigardataj kiel aludoj, ĉar kiam oni pruntas ilin por siaj verkaĵoj, la legantoj povas tuj kompreni la signifon.

En la ĉina lingvo aludoj abunde troviĝas aparte en la antikvaj verkoj, ĉar en la antikveco la aŭtoroj emis uzi ilin en siaj verkoj ĉefe por kondensi siajn ideojn aŭ sentojn en tre konciza formo, kaj la aludoj ĝuste estas ofte enhance riĉaj kaj forme simplaj. Dume la poetoj preferis aludojn aparte por pliriĉigi kaj belsonigi la rimojn en siaj poeziaĵoj.

Por montri la ecojn de la aludoj, mi prezentas jenajn ekzemplojn.

En la ĉina lingvo la vorto “tui” signifas “puŝi” kaj alia vorto “qiao” signifas “frapi”, sed se ambaŭ vortoj estas ligitaj kune kaj fariĝas kunmetita vorto “tui-qiao”, ĝi signifas cerbumadon pri lingvaĵo. Oni bone scias, ke puŝi kaj frapi estas movoj de la manoj, dum cerbumado estas funkcio de la cerbo. Do, kiel “puŝi-frapi” povas ludi la rolon de la cerbo? Por klarigi tiun enigman vortouzon, mi klarigas la kialon. Tiu aludo devenis el jena legendo: Poeto Jia Dao (779-843) faris poemon, rajdante sur azeno tra strato. Unu verso el la poemo estas: “Bonzo frapis pardon en lunlumo”. Poste li pensis, ke eble la vorto “puŝi” estas pli taŭga ol “frapi”. Li longe cerbumadis pri la vortouzo, sed ne povis fari decidon. Hazarde li renkontis erudiciulon Han Yu (768-824), li konsultis lin kaj petis lian definitivan selekton. Post pripensado Han Yu diris al li, ke la vorto “frapi” estas pli taŭga. Sekve la kunmetita vorto “tui-qiao” ekhavis la sencon de cerbumado pri vortouzo.

Foje Konfuceo diris al siaj disĉiploj pri sia aĝo: “En la dekkvina jaro mi inklinigis mian tutan koron al lernado. En la

trideka mi jam firme staris inter homoj. En la kvardeka mi ne plu havis dubojn...” La Majstro diris tion al la disĉiploj, por ke ili diligente lernu por posedi noblan virton kaj multajn sciojn kaj fariĝu homoj kun firma humanisma idealo. Ĉar Konfuceo estis respektata kiel la plej granda sanktulo, liaj vortoj estis multfoje cititaj de kleruloj dum la pasintaj jarcentoj. Sekve, liaj diraĵoj pri la aĝo fariĝis aludoj preferataj de la kleraj ĉinoj, kiuj emas uzi la vorto-grupon “aĝo de firma starado” kaj “aĝo sen dubo” por aludi respektive 30-jaran aĝon kaj 40-jaran aĝon. Per tiuj aludoj ili volas montri, unuflanke, sian inteligentecon kaj, aliflanke, sian deziron sekvi la instruon de la Majstro.

En la ĉina lingvo oni ofte uzas la vorton “zhiyin” (sonokomprenanto) kiel sinonimon de “intima amiko”. Tiu vorto estas aludo deveninta el antikva anekdoto: iu sinjoro nomata Yu Boya tre lertis en ludo de kord-instrumento, kaj alia sinjoro nomata Zhong Ziqi havis profundajn sciojn pri muziko. Kiam Yu Boya ludis la muzikilon por esprimi sian senton pri alta monto aŭ sian laŭdon pri fluanta akvo, Zhong



Ziqi tuj komprenis kaj ĝoje kriis: “Ho, bonege! Kiel alta kaj majesta la montego!” aŭ “Kia impone ondanta riverego!” Poste, kiam Yu informiĝis pri la forpaso de Zhong, li rompis la kordon de la muzikilo, ĉar li opiniis, ke neniu alia krom Zhong komprenos lian muzikon. Tiu rakonto estas tre kortuŝa, oni do ekstraktis el ĝi la vorton “sonokomprenanto” por aludi intiman amikon kun profunda interkompreno.

“Mirrakontoj de Liaozhai”, unu el la allogaj ĉinaj klasikaj literaturaĵoj, aperis en Esperanto, dank’ al la penado de akademi-ano Laŭlum. En tiu beletraĵo troviĝas multaj aludoj.

El la rakonto “Linda” mi citas du aludojn. Unu el ili estas “Persikflora Fonto”. Tiu aludo devenis el fantazia verkaĵo de la elstara pastoralo poeto Tao Yuanming (365-427). La poeto skribis: Foje iu fiŝkaptisto hazarde eniris per sia boato en la vilaĝon “Persikflora Fonto”. Li trovis, ke la loko estas belega kaj la loĝantoj, kies prapatroj rifuĝis tie por eviti la tiranan regadon de la Unua Imperiestro de Qin-dinastio (221-206 a. K.), estas bonkoraj kaj fervoraj. Dum la pasintaj jarcentoj ili estis absolute izolitaj de la ekstera mondo kaj sciis nenion pri ĝiaj politikaj ŝanĝiĝoj kaj socia haoso. Tamen ili vivis harmonie kaj senzorge, pace kaj trankvile. Sed poste, kiam la fiŝkaptisto deziris refoje viziti la lokon kun aliaj homoj, ili ne povis trovi la vojon. Tiu utopia vilaĝo poste fariĝis aludo pri paradizo en la homa mondo.

La alia estas “ora domo”. Tiu aludo venis el rakonto pri la imperiestro Wudi de Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.). Laŭdire,



La aŭtoro (maldekstre) kaj s-ro Chen Yuan

kiam li estis ankoraŭ infano, lia onklino promesis edzinigi al li sian ĉarman filinon, li tuj esprimis: “Mi nepre konstruos oran domon por ŝi.” Sekve “ora domo” fariĝis aludo pri luksa domo speciale por loĝigi amantan belulinon.

Cetere, mi devas aldoni, ke apliki aludojn tute ne estas la privilegio de intelektuloj, kaj ankaŭ al la ordinaraj ĉinoj ne mankas bonaj aludoj. La interesaj rakontoj el la klasikaj noveloj estas tre familiaraj al la popolanoj, kiuj ŝatas preni bravajn agojn de herooj kaj miraklan batal-arton de strategiistoj kiel impresajn kaj facile kompreneblajn aludojn.

Strangaj antikvaj aludoj estas malofte vidataj en la nuntempa ĉina lingvo, fakte ili jam fariĝis arkaikaj sen praktika valoro, dum la aliaj ofte uzataj, kiel la supre menciitaj “puŝi-frapi”, “sonokomprenanto” kaj “persikflora fonto”, fariĝis popularaj idiotismoj kaj ankoraŭ validas.

Verŝajne, la supre skribita parto jam sufiĉas por mia mal-

longa artikolo, kaj mi devas doni al ĝi la lastan punkton. Tamen mi pensas, ke estas preferinde je la fino prezenti plian aludon, kiu devenis el jena anekdoto: La reĝo de regno Qi (475-221 a. K.) ŝatis aŭskulti muzikon ludatan de ensemblo el tricent muzikistoj per *ju* (blovmuzikilo). Sinjoro Nanguo, kiu fakte ne scipovis ludi la muzikilon, venis al la kortego kaj mensogis, ke li kapblas ludi bone. La reĝo kredis kaj per alta salajro aligis lin al la ensemblo. Post la morto de tiu reĝo, lia filo surtroniĝis. Ankaŭ la nova reĝo ŝatis ĝui tiun muzikon, sed, malsame kiel la patro, li preferis la muzikon ludatan ne de la ensemblo, sed de Tiu aludo estas kutime uzata por humiligi tiujn, kiuj okupas lokon per fuŝa laboro. La ĉinaj intelektuloj emas apliki tiun aludon ankaŭ por modeste esprimi, ke lia laboro ne estas kontentiga. Mi do devas diri, ne nur por modesteco sed ĉefe pro honesto, ke tiu ĉi artikolo el mia plumo estas nur fuŝa skribaĵo same kiel la muzikludo de Nanguo. ■

# Memore al Ivo Lapenna, la moderna Esperanto-Movado

de BIRTHE LAPENNA (Danio)

**O**KAZE de la 10-a datreveno de la forpaso de mia edzo, Ivo Lapenna (1909-11-05 — 1987-12-15), oni petis min skribi artikolon pri li. Mi deziras mallonge memorigi la esperantistaron pri la grandega signifo, kiun li havis por la Esperanto-Movado.

Frue Ivo Lapenna estis internacie orientita. Kiel 17-jara gimnaziano li sciigis pri la Internacia Lingvo. Li tuj komprenis ĝian geniecon kaj komencis mem studi ĝin. En 1929 li iniciatis kaj kunfondis la Studentan Esperanto-Klubon en Zagreb. Jen citaĵo el "Esperanto en Perspektivo", p. 84-85: "En universitataj medioj sukcese agis studentaj aŭ akademiaj Esperanto-kluboj en pluraj landoj. ... La plej aktiva el ili sendube estis la studenta, poste Akademia Esperanto-Klubo en Zagreb (1929-1941), kiu ĝis aprilo de 1941, kiam la naziaj-faŝistaj armeoj invadis Jugoslavion, funkciis ankaŭ kiel administra centro de Studenta Tutmonda Esperanto-Ligo (STEL-o)." Ekde 1937 ĝis 1950 li estis prezidanto de Jugoslavia Esperanto-Ligo kaj estrarano de UEA ekde 1947.

Ivo Lapenna estis ankaŭ redaktoro de la fama, jugoslavia organo "La Suda Stelo", revuo socia, kultura, literatura kaj pri-

movada. Ĝi aperas — kun kelkaj interrompoj — ekde 1932. Dum lia multjara redaktado ĝi influis la tutan Esperanto-Movadon. Hodiaŭ ĝi estas la plej grava fonto de la tiama Esperanto-historio. Ivo Lapenna mem verkis multegajn artikolojn, ofte sinonime, ĉar li opiniis, ke ne estis oportune, ke lia nomo tro ofte aperu. Ekde 1981 sub la ĉefredaktado kaj gvidado de Ivo Lapenna la kultura kaj informa revuo "Horizonto" (eldonita en Kopenhago) fariĝis same influa kaj historie valora kiel la tiama "La Suda Stelo".

Ekskluzive pro politikaj kaŭzoj Ivo Lapenna forlasis Jugoslavion en 1949. Li venis al Parizo, kaj en 1951 li translokiĝis al Londono, kie li ricevis postenon en Universitato de Londono. Tie li fariĝis profesoro pri Kompara Sovetia kaj Orient-eŭropa Juro, per kio li atingis sian duan profesorecon.

Kiel estrarano kaj ekde 1955 ĝenerala sekretario de UEA, Ivo Lapenna iniciatis kaj gvidis multnombrajn agadojn, sed nur kelkaj estas menciitaj ĉi tie. Ekz. en 1949: Internacia Somera Universitato (nun Internacia Kongresa Universitato); Belartaj Konkursoj kaj Oratora Konkurso (siampe premiita per la arĝenta "Pokalo Ivo Lapenna"); 1952: "Centro de Esploro kaj Dokumentado" (CED); 1952-1954:

Grandaj kampanjoj (miloj da artikoloj kaj impona ekspozicio) lige kun la Peticio al UN/UNEKSO, kronitaj per la konsultaj rilatoj inter 1959, kun amaso da artikoloj en nacilingvaj periodaĵoj, ekspozicioj, prelegoj, informoj en radio kaj televido, festoj okaze de plia rondvojaĝo de Ivo Lapenna en kelkaj landoj kun kulmina, altnivela festo en Kopenhago. Zamenhof estis deklarita kiel unu el la grandaj personoj de la homaro fare de UNESKO; 1961: Aĉeto de la domo de UEA en Rotterdam per rimedoj havigitaj ĉefe dank' al jura argumentado kaj negocado de Ivo Lapenna. Oni bone komprenas la fakton, ke Ivo Lapenna ricevis la epiteton "La konstruinto de la moderna Esperanto-Movado".

Ivo Lapenna iniciatis kaj gvidis la sukcesan kampanjon pri la Peticio 1966 por progresigi Esperanton en internaciaj medioj pere de la Propono al UN okaze de la Jaro de Internacia Kullaboro — la plej impresa iam ajn prezentita de privata instanco (UEA). Preskaŭ unu miliono da individuoj kaj iom malpli ol 4 000 organizaĵoj subskribis la Peticion. Bedaŭrinde, ĝis nun ĝi ne efektiviĝis.

Jam de la komenco Ivo Lapenna komprenis, ke Esperanto ne estas nura lingvo, uzebla sole

# kreinto de la lo

por privata ĝuo kaj interkompreniĝo. Ĝi estas antaŭ ĉio rime- do por internaciigi kaj solidarigi la homaron sendepende de reli- gio, raso, nacio kaj socia tavolo. Certe estas rekomendite, ke ĉiuj seriozaj esperantistoj studu la verkojn de Ivo Lapenna kaj sek- vu lian ekzemplon, nome pro- fundiĝu en la lingvo mem, instru- ĝin, informu pri ĝi, sed en taŭga maniero. Ivo Lapenna forte ad- monis, ke ni discipline konser- vu la lingvounuecon bazitan sur la Fundamento, kaj ke oni ĉesigu la deformon de la lingvo mem, zorge elektu la plej kompetent- ajn membrojn al “Akademio de Esperanto”, kaj ke ĉiuj unuece respektu la Fundamenton.

Ivo Lapenna, kiu ja iniciatis kaj fondis “Centro de Esploro kaj Dokumentado”, estis ankaŭ ĝia direktoro ĝis 1974. En tiu jaro li ja forlasis ĉiujn siajn postenojn en UEA.

En 1976 Sarlanda Esperan- to-Ligo organizis la unuan “In- ternacia Esperanto-Konferenco de la Neŭtrala Esperanto-Mova- do”. Tiaj konferencoj estis or- ganizitaj ĉiujare ĝis 1987. La Internacia Centro de la Neŭtrala Esperanto-Movado (ICNEM) estis fondita en Strasburgo en 1980, por ke ĝi estu bazo por la kultura kaj informa revuo “Ho- rizonto”, lanĉita jam en Hispanio 1976.



Ekde 1981 Ivo Lapenna faris sian plejebelon, por ke ni ĉiuj kune celebru la Jubilean Jaron per gran- dega manifestacio.

La krono de tiu agado estis lia organizado de la “Internacia Jubilea Esperanto-Konferenco: Cent Jaroj de Esperanto-Kul- turo”, Graz 1987. Dek el la plej fake kompetentaj esperantistoj lekiis, la monumento “La Es- pero” estis starigita kaj inaŭgurita samtempe kun la nova “Esperan- to-Placo”, kaj multaj aliaj kul- turaj eventoj estis organizitaj.

Ekde lia junaĝo, humaneco kaj internaciismo estas funda- mentaj trajtoj de lia karaktero. Lia lasta Festparolado eldirita dum la Internacia Jubilea Espe- ranto-Konferenco en Graz, 1987,

havis la titolon “Esperanto kiel Lingva Esprimo kaj Instrumen- to de ‘Humaneca Internaciismo’”. Liaj du konceptoj “Humaneca In- ternaciismo” kaj “Aktiva Neŭ- traleco” estis la bazo de lia laboro.

Ivo Lapenna tro frue forpa- sis kaj postlasis multajn nefini- tajn laborojn. Lia arkivo konsis- tas el abunda materialo, kiu va- loras seriozan studadon de fidinda historiisto. Ankaŭ nun oni pov- as elĉerpi el liaj verkoj en Espe- ranto. En recenzo de d-ro Ver- loren van Themaat pri la verko de Ivo Lapenna “Elektitaj Paro- ladoj kaj Prelegoj” (suplemento al “Retoriko”) 1966 estas skribita: “...Kiel gvidantojn la Esperan- to-Movado bezonas ne homojn, kontentajn teni la aferon funk- cianta, sed homojn daŭre streban- tajn progresigi la aferon, kaj tia persono estas Lapenna! Ankaŭ pri la ideologia fono de Esperanto, egalrajta kunlaborado de ĉiuj homoj, li parolas multe. Estas frapante, kiel profunde Zamen- hof influis homojn multrilate pli talentajn ol li mem!”

Fine, mi havas ĝojigan infor- mon. La 23-an de aŭgusto 1997 fondiĝis en Vieno la “Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna”. Ĝi okupiĝos pri la persono kaj pri la agado de Ivo Lapenna. Ĝia celo estas studi liajn verkojn, in- formi la gazetaron kaj protekti liajn nomon kaj verkojn. ■



# Du poemoj

de JULIUS BALBIN (Usono)

## La masakro

*Tuj post kiam en decembro, 1937  
la japanoj okupis Nankinon,  
ili komencis postĉasi  
senkulpajn civilulojn  
por amasmurdi ilin.*

*Por la murdocelo  
servis pafiloj, pistoloj, bajone-  
toj*

*kaj eĉ simplaj tranĉiloj.*

*Dum ses semajnoj  
la sovaĝaj agresintoj  
viktimitis plurajn centmilojn  
da viroj, virinoj kaj infanoj.  
Dum la urbo brulegis,  
la japanaj soldatoj pelis  
la senkulpajn viktimojn  
al Xiaguan ĉe l' bordo  
de Yangzi-rivero  
por ilin senkapigi.*

*La viktimoj devis stari en vicoj,  
kiam tiuj en la unua rango  
estis senkapigataj.  
Tiuj en la dua rango  
ĵetis la kadavrojn en la riveron*

*kaj poste restariĝis en vicoj  
por esti senkapigitaj.*

*En la dua tago  
la japanoj eklaciĝis  
kaj decidis uzi maŝinpafilojn.  
La viktimoj provis sin savi,  
saltante en la rivero,  
sed neniu el ili  
sukcesis atingi la kontraŭan  
bordon.*

*La nepardonebla krimego  
de l' japanaj agresintoj  
ŝajnis nur inkubsonĝo  
al tiuj, kiuj ĝin ne travivis.  
Sed ĝi estis kruela fakto,  
kiu skuis la konsciencon  
de l' tuta homaro.*

## Kie vi estis?

*Ho, Dio de Israelo,  
kie vi estis  
inter la jaroj 1933 kaj 1945?  
Kien vi forkuris,  
al kiu sekura rifuĝejo?*

*Ĉu eble vi ankaŭ timis  
esti deportita al mortolagro,  
asfiksiita per gaso  
kaj bruligita en krematorio?*

*Ĉu ankaŭ vin fortimigis  
tiu **furor teutonicus\***  
de l' ĝermanaj triboj,  
al kiu la Satano donis la formon  
de naziaj barbaroj?*

*Kie do kaŝiĝis  
via legendeca ĉiopovo,  
via biblia potenco,  
en kiun tiel blinde kredis  
viaj israelaj idoj?*

*Ĉu vin ankaŭ fortimigis  
la aŭstra kaporalo  
per sia tondra  
kaj ĉion surdiga voĉo?*

*Ĉu la aŭstra kaporalo  
vere sukcesis venki  
la ĉiopovan Eternulon  
kaj neniigi lian regnon  
sur la tero?*

\* Teŭtona furio

## *Libroj eldonitaj de Ĉina Esperanto-Eldonejo (1994-1996)*



### **Analektoj de Konfuceo**

Konfuceo. Trad. Wang Chongfang. Beijing, 1996. 114p. 21x15 cm. Bind.

La Konfuceana Biblio: kolekto de diroj kaj faroj de Konfuceo kaj liaj disĉiploj kiuj prezentas la vidpunktojn de Konfuceo pri politiko, filozofio, edukado, literaturo, arto, etiko, principoj de morala konduto.

Prezo: 14,00 USD Sendokosto: 3,00 USD

### **Bakin kaj Esperanto** (en la ĉina lingvo)

Komp. Xu Shanshu. Beijing, 1995. 436p. 22x14 cm. Ilus.

Bakin estas fama ĉina verkisto kaj tradukisto, kaj ankaŭ veterana esperantisto. La libro konsistas el tri partoj: verkaĵoj, tradukaĵoj kaj leteroj. Al la libro estas aldonitaj kronologiaj notoj pri la aktivado de Bakin, kiuj estas valoraj por koni la rilatojn inter Bakin kaj Esperanto.

Prezo: 6,00 USD Sendokosto: 3,00 USD

### **Ĉina ceramiko**

Zhao Hongsheng. Trad. Wang Chongfang. Beijing, 1994. 260p. 18.50x12cm.

Ĉinio estas hejmlando de porcelanaĵoj. La ceramika produktado de Ĉinio komenciĝis en neolitiko. La libro detale konigas la historion de la ĉina ceramiko.

Prezo: 6,00 USD Sendokosto: 1,50 USD

### **222 simplaj versaĵoj por komencantoj**

Originale verkita de Laŭlum. Beijing, 1995. 127p. 18x11cm.

Riĉa kolekto da etaj facile lerneblaj kaj memoreblaj poemoj, precipe por lernejanoj, sed frandeblaj por ĉiuj aĝoj.

Prezo: 6,00 USD Sendokosto: 1,50 USD

### **Enciklopedieto de Ĉinio**

Komp. Li Qiang kaj Zhang Meizhi. Trad. Fan Yizu. Beijing, 1994. 330p. 20.50x14cm. Ilus.

La libro konigas la ĉinajn historion, geografion, kulturon, pikturon, metiarion, literaturon, turismon, Esperanto-movadon k.a. Se vi volas havi sciojn pri Ĉinio aŭ fari turisman vojaĝon al ĝi, legu la libron, kiu certe interesos kaj helpos vin.

Prezo: 6,00 USD Sendokosto: 3,00 USD

### **Internacia vortaro de mikroba genetiko** (Esperanta-angla-ĉina)

Komp. Rolph A. Lewin. Beijing, 1994. 117p. 18.50x13cm.

La vortaro entenas pli ol 700 terminojn. Krom terminoj specifaj en mikroba genetiko kaj molekula biologio, la vortaro entenas ankaŭ la plej ofte uzatajn terminojn de la ordinara genetiko (de eŭkariotaj plantoj kaj bestoj) kaj biokemio.

Prezo: 8,00 USD Sendokosto: 1,50 USD

### **Mirrakontoj de Liaozhai**

Pu Songling (1640-1715). Trad. Laŭlum. Beijing, 1994. 541p. 21x14.50cm. Ilus. Bind.

La Esperanta versio "Mirrakontoj de Liaozhai" kun 86 pecoj elektitaj el la fama klasika verko "Mirrakontoj de Babilo-ĉambro" de Pu Songling. Prenante popolrakontojn kiel materialon de sia verko kaj aplikante romantikismon kaj realismon en kombino kaj lingvon vivecan, li kreis interesajn intrigojn kaj personigis vulpojn kaj fantomojn por esprimi sian indignon kontraŭ la malluma feŭda socio.

Prezo: 15,00 USD Sendokosto: 5,00 USD

### **Paŝoj al pli alta ŝtupo**

Komp. kaj trad. Hao Duoren. Beijing, 1994. 195p. 18.50x12cm.

La libreto entenas 150 artikolojn pri konversacioj, fabloj, rakontoj kaj prozaĵoj. La artikoloj estas vicigitaj laŭ facileco, la vortfarado regula kaj la tekstoj enhavriĉaj kaj interesaj. La libreto taŭgas por komencantoj en memlernado kaj ankaŭ povas esti uzata kiel helpa legaĵo por elementa kurso.

Prezo: 6,00 USD Sendokosto: 1,00 USD

### **Provu por via sano**

Komp. kaj trad. Liu Caisheng. Beijing, 1994. 132p. 18.50x12cm.

La libreto prezentas sanigajn ekzercojn kaj dekelke da metodoj de memmasaĝo kontraŭ ordinaj malsanoj. La 44 bildoj en la libreto faciligas ekzercadon kaj masaĝon.

(Daŭrigo sur p. 39)

# Aĉeto de kato

**I**NĜENIERO kaj logikisto estis intimaj amikoj. Foje ili kune vojaĝis. Atinginte la celon, la logikisto kutime faris ĉiutagan tagnoton en hotelo kaj la inĝeniero promenis sur strato. Subite la inĝeniero aŭdis krion de maljunulino: "Kiu aĉetos katon? Kiu aĉetos katon?"

La inĝeniero sin turnis kaj vidis, ke ĉe la maljunulino estas nigra ludilo kato. Ĝia prezo estas 500 usonaj dolaroj. La virino klarigis, ke la kato estas heredita valorajo de ŝia familio, ĉar ŝia nepo serioze malsaniĝis, do ŝi vendas ĝin por kuracado. Prenante la katon, la inĝeniero trovis, ke la kato estas tre peza, ŝajne el gisfero, tamen la okuloj estas perlaj.

Do, la inĝeniero diris al la maljunulino: "Mi volas pagi 300 dolarojn por la okuloj."

La maljunulino konsentis. Ĝoje reveninte la hotelon, la inĝeniero diris al la logikisto: "Mi aĉetis du grandajn perlojn per 300 usonaj dolaroj"

La logikisto opiniis, ke la perloj kostas almenaŭ mil usonajn dolarojn. Li do demandis pri la detalo. La inĝeniero respondis. La logikisto demandis plue: "Ĉu la virino ankoraŭ estas tie?"

La inĝeniero respondis: "Jes, ŝi estas vendita la feran katon sen okuloj."

La logikisto kuris al la strato kaj aĉetis la katon kontraŭ 200

usonaj dolaroj. La inĝeniero mokis lin: "Vi malŝparis 200 usonajn dolarojn por blinda fera kato!"

La logikisto silente priirigardis la katon. Subite, lian menson lumigis ia saĝa penso. Li prenis tranĉileton kaj per ĝi skrapis la katon. Kiam la tegaĵo defalis, aperis antaŭ li ora kato. Li ĝoje kriis: "Mi pensis ĝuste, ke la kato estas ora!"

Kiam la mastro faris la ka-

ton, li timis ke oni vidos ĝian oran korpon, do li tegis la katon per nigra lako kaj la kato ŝajnis fera. Tion la inĝeniero tre bedaŭris.

Tiam la logikisto turnis sin kaj ĝoje diris al la inĝeniero: "Kvankam vi estas erudicia, tamen mankas al vi logika pensado. Vi analizis ne profunde. Vi devas cerbumi, ĉu la korpo povas esti el fero, se ĝiaj okuloj estas perlaj." ■





## ĈINIO

● La 15-an de decembro 1997 la Xinxiang(Ŝinŝjang)-a Esperanto-Asocio de Henan-provinco kaj Esperanto-Asocio de la Hefei-a Politekniko de Anhui-provinco kunvenis memore al la 138-a datreveno de la naskiĝo de Zamenhof. Antaŭ tio kunvenis ankaŭ la Nanchang-a Junulara Esperanto-Asocio de Jiangxi(Ĝjangŝji)-provinco kaj la Junulara Komisiono de la Zaozhuang-a Esperanto-Asocio de Shandong-provinco. La 20-an de decembro tiujare esperantistoj de Lanzhou, Gansu-provinco, kunvenis por celebri la 110-an datrevenon de la naskiĝo de Esperanto. (Han Daozhu, Liu Yanchun, Bao Jincai)

● De oktobro 1997 Esperanto estas instruata kiel nedeviga lernobjekto en la Hefei-a Politekniko. Laŭ la plano por ĉiu staĝo estas 128 lernohoroj. Nun 39 personoj partoprenas en la lernado. (Duan Youzhi)

● Lastatempe la Internacia Agrikultura Esperanto-Asocio publikigis anoncon en ĉina monata gazeto pri agrikulturo kun la celo divastigi Esperanton kaj kolekti disertaĵojn. La asocio laŭeble publikigos anoncon en agrikulturaj gazetoj naci-lingvaj de la mondo. Tiuj, kiuj interesiĝas pri tio, kontaktu Huang Yinbao. La adreso: Scienca Komitato de Jingchuan-gubernio, Gansu-provinco, CN-744300, Ĉinio.

● En oktobro 1997 la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de la Ĉina Popola Respubliko emisiis la poŝtmarkoseriojn "La 8-a Tutlanda Sportkunveno de PR Ĉinio", "La Floroj", "La Ĉiela Altaro", "Pejzaĝoj en la Monto Huangshan" kaj "Urbomurego de Xi'an". La Haikou-a Poŝtmarka Kompanio de Hainan-provinco uzis en la emisijaj tagoj memorigajn poŝtstampilojn en la ĉina lingvo kaj Esperanto. La desegninto de la poŝtstampoj estas s-ro Zhang Linrui.

## ĈEĤIO

● ĈEA-a Konferenco okazis en la ĉefurbo Praha kun pli ol 150 partoprenantoj, inkluzive de geesperantistoj, reprezentantoj de lokaj E-kluboj, ĈEA-aj sekcioj, komisionoj kaj gastoj eĉ eksterlandaj, inter 28/30, 11, 1997, kiam festis sian 95-jariĝon la Klubo Esperantista Praha. Tiun ĉi gravan datrevenon memorigas ankaŭ la ĉeĥa poŝto, nome loka poŝtoŝtampoficejo en sudmoravia urbeto Straznice (Gardejo), distr. Hodonin, per porokaza E-lingva afrank-maŝin-stampo. (Vladislav Hasala)

## DANIO

● En la kadro de Martinus-Instituto okazis Esperanto-semajno inter la 9-a kaj 16-a de aŭgusto 1997 kaj ĉeestis pli ol 40 personoj el Danio, Svedio, Rusio, Ĉeĥio, Svisio, Hungario, Pollan-

do, Argentino, Meksikio kaj Ĉinio, el kiuj duono sekvis la instruadon pri kosmologio kaj la alia duono studis Esperanton per Cseh-metodo. En 1998 estos du Esperanto-semajnoj en Martinus-Centro, Klint, inter la 9-a kaj 22-a de aŭgusto. Ni jam invitis tri instruistojn, sed ĉefe ja rolas la instruado de la spirita scienco aŭ kosmologio de Martinus. Oni povos ĉeesti 1 aŭ 2 semajnoj, laŭplaĉe. (Ole Therkelsen)

## HISPANIO

● Okaze de la 138-a datreveno de la naskiĝo de L. L. Zamenhof, KAE organizis feston en la urbo Sabadell, Katalunio, la 14-an de decembro 1997, kiu konsistis el du gravaj eventoj: Unue, vizitoj al la monumento al Zamenhof kaj la strato "Lluis Mimo", grava esperantologo kaj verkisto. Due, omaĝoj al s-roj Vicente Hernandez, redaktoro de la revuo KAE kaj regula kunlaboranto en la redakcio de la bulteno de Hispana Esperanto-Federacio, kaj Giordano Moya, verkisto de la trilogio: La Homa Vivaventuro, Esperanto en Perspektivo kaj Survoje al Universala Civilizacio. Je la fino de la festo s-ro Josep Ma Galofre, presi-



Zamenhofa festo en Sabadell

danto de KAE, transdonis al ili belajn plakojn. Ankaŭ la prezidanto de BEC s-ro S. Aragaj transdonis al ili ekzemplerojn de la libro "Ekstretoj", subskribitaj de la ĉeestantoj, kaj al iliaj edzinoj bukedon. (Barcelona Esperanto-Centro)

## POLLANDO

● Pola Esperanto-Asocio, Filio en Koszalin, organizos en la tagoj 9-18 de junio 1998 la XX-an Jubilean Internacian Renkontiĝon de Esperantistoj kaj Naturamantoj en atrakcia kaj tre ĉarma ripozloko Mielno. Intertempe okazos lingvo-perfektigado por komencantoj kaj progresintoj, interesaj prelegoj, E-videofilmoj, konkursoj kun valoraj premioj, kantado, dancado, bivakfajro kun kolbasetrostado ktp. Adr.: Pola Esperanto-Asocio, Poŝtkesto 30, 75-016 Koszalin - 1, Pollando. (Pola Esperanto-Asocio)



Kolonoj kun akrobatikaj gravuraĵoj

*De la malgrandaj infanoj  
Ĝis la geavoj grandaĝaj  
Ĉiuj Wuqiao-anoj  
Estas lertaj akrobatoj*

Jen bone konata popoldiro cirkulanta en Wuqiao-gubernio, Hebei-provinco, Ĉinio. Wuqiao estas fama akrobatika gubernio. Por ke la akrobatoj havu lokon por montri sian talenton, la tiea registaro elspezis grandan sumon kaj konstruigis palacon kun areo de 200 hektaroj destinitan por okazigi akrobatikan konkurson, prezenti la popolan arton kaj kulturajn akrobatojn. La palaco estas nomata ankaŭ akrobatika mondo, kiu konsistas el kultura urbo, akrobatika domo kaj ĵonglejo, kun akrobatikaj totemaj kolonoj. La palaco el nigraj brikoj kaj verdaj tegoloj aspektas kiel eleganta antikva konstruaĵo kun la arkitekturaj trajtoj de Ming- kaj Qing-dinastioj. Tie vidiĝas ankaŭ gazono kaj fontano. Ĝi estas la unika ĉina turisma loko kaj amuzejo ĉefe kun akrobatikaj aranĝoj.

Tie oni povas ĝui diversajn prezentojn, kiaj akrobataĵoj, rakontado de historiaj epizodoj, operoj, ĵonglado kaj ludo de simioj. Tie ĝueblas ankaŭ programeroj premiitaj en internaciaj konkursoj. La palaco altiris al si multajn akrobatojn kaj turistojn ĉinajn kaj alilandajn. Ĝi estas uzata por levi la nivelon de la popola akrobatiko, kaj plie, ĝi multe akcelis la disvolviĝon de la tiea turisma afero.

# Akrobati

Fotoj de LI CHUNGENG kaj SUN BAOQI




Piedturnado de vazo kun homo

# ka palaco



Transsalto de ringoj kun tranĉiloj kaj fajro



Ekvilibro

Ĉigong-isto peze premata





# Manĝetoj de Shaxian-gubernio

de ZHOU SHUZHEN

**E**N diversaj lokoj de Ĉinio videblas lunĉejoj kun la ŝildo “Manĝetoj de Shaxian-gubernio”. Eĉ en Kashi ĉe la okcidenta landlimo oni povas ĝui bongustaĵojn de Shaxian. En la gubernio, ĉe la stratoj staras en vicoj lunĉejoj kaj bonodoras cent specoj da manĝetoj, antaŭ kiuj oni

en Shaxian oni metas farĉon en pulvoron de toŭfuo kaj faras ĝin knelo por kuiri aŭ friti.

En ĉinaj vilaĝoj oni festas la 23-an de la 12-a monato laŭ la ĉina luna kalendaro. Legendo diras, ke en tiu vespero la dio de kuirejo flugos ĉielen por “raporti” pri la homa mondo. Ĉiuj familioj

La familianoj ĝuas la manĝeton kun bruna sukero kaj sezama pulvoro. “Ciba” simbolas kuniĝon kaj feliĉon de la familio. Se la forvojaĝantoj manĝas ĝin en malproksimaj lokoj, ili certe rememoras pri la hejmloko.

En “Printempo-komenco” (kelkajn tagojn post la Printempa Festo) ĉinoj kutimas manĝi “ĉunĝjŭan” — volvitan past-pecon kun farĉo el viando kaj legomoj. “Ĉun” signifas printempon kaj “ĝjŭan” volvaĵon. “Ĉunĝjŭan” havas formon de silkraŭpa kokono, tamen pli granda ol ĝi. La deveno de “ĉunĝjŭan” rilatas al la bredado de silkraŭpo, kiu manĝas foliojn de morusarbo. Antikve, kiam la morusarbo burĝonis, la silkraŭpaj bredistoj oferis “ĉunĝjŭan” al la silkraŭpa dio dezirante riĉan rikolton. Iom post iom “ĉunĝjŭan” iĝis printempo-komenca manĝaĵo por la popoloj kaj eĉ por la kortego. En malsamaj lokoj estas malsamaj farĉoj viandaj kaj ankaŭ vegetaraj el paŝtista kapselo, tub-ajlo, sojfab-ĝermo, celerio, ĉina ŝenoprazo, rafano ktp. En Shaxian, la legomoj tre frue vendiĝas en bazaro kaj la lokanoj preparas “ĉunĝjŭan” kun diversaj freŝaj gustoj.

Shaxian-anoj ĝuas la “donacon” de la naturo kaj deziras, ke ankaŭ multaj aliaj ĝuu la bongustaĵojn. Ĉiujare okazas “Festo de Manĝetoj” en Shaxian, kie ankaŭ konstruiĝis “strato de manĝetoj”. En la tuta Ĉinio dissemiĝas pli ol 3 000 lunĉejoj “Manĝetoj de Shaxian”. Tiaj lunĉejoj eĉ troviĝas en Singapuro en Sudorienta Azio kaj sur la insulo Sajpano en Pacifiko. ■



Lunĉejoj de bongustaj manĝetoj de Shaxian-gubernio

malfacile decidas kion manĝi.

La pitoreska Shaxian situas en la centro de Fujian-provinco en sudorienta Ĉinio. Tie la klimato estas varmeta kaj humida. La fekunda tero donas fruktojn, fungojn, legomojn kaj grenon. Historie, nordanoj kelkfoje migris tien kaj kunportis diversajn kuirartojn, tiel Shaxian iĝis loko, kie kuniĝas kulturoj pri manĝoj nordaj kaj sudaj.

Shaxian-anoj havas antikvan manieron ellabori farĉon — metinte viandon sur tabulon, ili batas ĝin per bastono anstataŭ haketi per haketilo. Oni diras, ke nur tiel restos la origina gusto de la viando. Toŭfuo estas populara manĝaĵo de Ĉinio. En norda Ĉinio oni fritas toŭfuajn pecojn, tamen

omaĝas al li per bongustaĵo antaŭ lia forflugo kun la deziro, ke li raportu nur bonaĵojn. Tiu kutimo devenis de antikva kulto al dioj. La ĉefaj oferaĵoj estas dolĉaĵoj el maltozo, rizo kaj sezamo. Ĉar tiuj povus “dolĉigi” la vortojn de la dio. La oferadon prezidas la dommastrinoj.

La virinoj de Shaxian tre lertas en kuirado. Ĉiutage ili preparas manĝaĵojn por sia familio. En la antaŭvespero de la Printempa Festo, ili ellaboras festenon. “Ciba” estas tradicia festa manĝaĵo. Ili metas gluecan rizon en akvon, poste elakvigas kaj vaporumas ĝin. Ili pistas la vaporumitan rizon en ŝtona pistujo per ŝtona aŭ ligna ilo kaj poste faras la pulvorigitan rizon ronda kuko.

# PLEKTI NOVAN VIVON PER BAMBUOJ

Teksto de MAO LUJI kaj ZHOU SHUZHEN

Fotoj de HAN HONG

**L**A urbeto Qingzhou (Ĉingĝou) apud montoj kaj ĉe rivero abundas je bambuoj. Ambaŭflanke de ĝiaj stratoj multas vendejoj de diversaj bambuaĵoj, kiaj korboj, seĝoj, ĉapeloj, kanoj, ŝosoj, manĝiloj, ludiloj, muzikiloj, boatoj kaj matoj. En la tuta urbeto aromas freŝaj bambuoj.

Situante en la meza parto de Fujian-provinco kun humida klimato, la urbeto estas ideala loko por kreskado de bambuoj. Ĉiuj Qingzhou-aj familioj kulturas bambuojn, kiuj estas fonto de iliaj ĉiutagaj necesajoj. Ili ĉiuj lertas en farado de plektaĵoj el bambuo kaj tiu metio herediĝas de generacio al generacio. Nuntempaj Qingzhou-anoj estas lertaj aparte en plektado de bambuaj matoj.

Bambua mato havas longan historion en Ĉinio. Komence ĝi estis uzata por sidado dum manĝado kaj poste nemalmultaj ĉinoj kutimiĝis dormi sur ĝi en somero por eviti varmon. Kun disvolviĝo de teknologio, pli kaj pli multiĝas la specoj de matoj. Antaŭe Qingzhou-anoj plektis matojn el bambuŝelo. Tiuj matoj malpezaj kaj supraj malmulte kostis. Nun oni produktas multe da matoj el bambubloketoj. Por fari tiajn matojn oni unue segas bam-



**Ekspozicio de bambuaj matoj en Qingzhou**

butrunkojn en bloketojn rektangulajn aŭ en formo de umefloro, poste ilin vaporumas, sekigas, poluras kaj truas kaj fine ilin kunligas per maldika ŝnuro el nilono. Kompare kun matoj el bambuŝelo, tiuj el bambubloketoj estas komfortaj, ne flaviĝas nek deformiĝas post kelkjara uzado. Pro tio ili estas facile vendataj, kvankam iom pli karaj.

Tiel la mato-industrio de Qingzhou rapide disvolviĝis. Preskaŭ ĉiuj tieaj familioj sin okupas pri tio. Tiutage, ni vizitis iun familion. En la korto iu virino lerte kunligis bambubloketojn. Mato pendanta post ŝi brilis sub la suno. Ŝi diris, ke ŝi povas fari du matojn ĉiutage kaj enspezas ĉiumonate 750 juanojn, kiuj ja sufiĉas por la vivteno.


Krom familiaj metiejoj kaj malgrandaj prilaborejoj de bambuaĵoj, en la urbeto estas

ankaŭ Bambuo-Grupo kune fondita de 72 kamparanaj familioj. Ĝia gvidanto Le Mingcong diris, ke antaŭe Qingzhou-anoj faris plektaĵojn el bambuo ĉefe por si mem kaj vendis nur la superfluaĵojn. Sed nun la loĝantoj havas koncepton pri merkata ekonomio kaj komprenas, ke oni malmulte profitis de familia metio. Tial ili kune starigis la entreprenon kun aŭtomata produktolinio por fari matojn pogrande, kaj ilia profito estas preskaŭ centobla kiom tiu de individuoj. Por havi pli grandan lokon en la merkato, la grupo aĉetis modernajn telekomunikaciajn ekipaĵojn kaj enoficigis fakulojn pri projektado, tekniko, vendo k.a. Ĝiaj matoj estas vaste ŝatataj pro sia bona kvalito.

Qingzhou-anoj sin riĉigis per bambu-plektado. Ili anstataŭigis siajn bambuajn dometojn per belaj etaĝdomoj kaj vojaĝas per aŭto aŭ trajno anstataŭ boato. Tamen ili komprenas, ke ili vivas de tiuj prosperaj bambuoj plene sur montoj. Ili estas nedisigeblaj de bambuoj. En festaj tagoj ili kantas kaj dancas akompanate de agrabla muziko ludata per bambuaj instrumentoj. En marto ĉiuj familioj iras al monto por forigi herbojn, planti bambuojn kaj oferi vinon al bambuoj — jen la Tago de Omaĝo al Bambuoj. ■



Vendo de bambuŝosoj



Bambuaj bloketoj uzataj por plekti matojn



En butiko de bambuaj metiartaĵoj





Plektado de bambuaĵoj


# Flegantoj de novnaskitoj

Teksto kaj fotoj de LIU ZHENG



Flegantoj de novnaskitoj

En la ĉambro de gravaj malsanuloj de la Pekina Ginekologi-obstetrika Hospitalo kuŝas gravedulinoj, kiuj suferas tro fruan rompiĝon de feta membrano, minacon de aborto, hemoragion antaŭ akuŝo... En la ĉambro estas eta distanco inter vivo kaj morto, kaj tio koncernas ĉiam la vivon de la gravedulino kaj la feto. La 9 flegistinoj por tiuj akuŝontoj deĵoras alterne tage kaj nokte. Ili tre atente faras ĉion: injekti, doni medikamenton, kontroli sonon de la feto... La plej malfacila laboro estas flegi frunaskitojn. Iuj pezas nur 2 kg kaj aliaj ne kapablas suĉi nek plori aŭ spiri. Tuj post sia naskiĝo ili estas metitaj en varman keston. La flegistinoj devas meti en iliajn naztruojn tubon por oksigeno



1. Flegistino kaj patrino de novnaskito
2. Antaŭ elhospitaliĝo de novnaskito
3. Novnaskitoj en varmaj kestoj
4. Ĉefflegistino observas frunaskiton.

# maskitoj

aŭ nutraĵo, fari envejan pogutigadon sur ilia kapo kaj ankaŭ bani ilin, ŝanĝi vindotukon... Zorge observi estas tre grave, ĉar se io estus neglektita, la vivo de la bebo estus minacata. Ĉiutage, la unua vorto en deĵorado de ĉeflegistino Xu Suzhen estas "Ĉu okazis io?" Hejme ŝi ofte sidas ĉe telefono por direkti la deĵorantojn pri eventuala okazaĵo, kia malfacila aŭ tro frua akuŝo. La patrinoj nomas ŝin savanto. Plejparto de la junaj flegistinoj estas fraŭlinoj, tamen la laboro ebligas al ili dividi la ĝojon kun la patrinoj kaj havigas al ili patrinan amon naturan kaj profesion. Iu flegistino gravediĝis, tamen ŝi daŭre deĵoras. Ŝi diris: "Mi volonte flegas ilin ĝis mi akuŝos."





# Belaj pejzaĝoj de Jiuzhaigou

Teksto kaj fotoj de LIU SIGONG

Funde de lago



Perla Malprofundaĵo



Velkinta arbo en lago



Kaskado



Fiŝoj naĝantaj ĉe "montoj"

Jiuzhaigou estas pitoreska loko de Ĉinio. Ĝi situas en la nordokcidenta parto de Sichuan-provinco. Tie vidiĝas tipaj karstaj pejzaĝoj: Akvo de degelinta neĝo kuras tra arbaroj kaj valoj kaj formas riveretojn, akvofalojn, lagojn kaj aliajn belajn pejzaĝojn.

La lagoj tie estas eterne klaraj kaj bluaj. En diversaj sezonoj la lagoj montras diversajn aspektojn. Funde de la lagoj la algoj kaj sedimentoj senĉese alikoloriĝas. Kiam venteto blovas, la akvosurfaco krispiĝas kaj estiĝas ondetoj. En la nebuleco kvazaŭ dancas drakoj en la akvo. En serenaj tagoj, kiam ĉesas vento, la blua ĉielo, blankaj nuboj kaj foraj montoj speguliĝas en la akvo kaj vidiĝas mirakla pejzaĝo: fiŝoj naĝas inter nuboj kaj birdoj flugas super lagfundo.

La alia grava trajto estas miksiĝo de lagoj, akvofaloj, rojoj kaj fontoj. La lagoj plejparte estas dividitaj per laktoblankaj digoĵoj el kalkŝtonoj. La riveretoj fluas jen sur altaj lokoj jen sur la malaltaj, jen rapide jen malrapide. Tio formas belajn kaskadojn: iuj imponas kiel animskua tondro kaj aliaj similas al ĉarma kanto. Sur ebenaj lokoj la riveroj fariĝas larĝaj kun malprofundaĵoj el saltantaj "perloj", kiuj brilas sub la suno.

Zigzagaj rojoj trafluas arbarojn, montojn kaj lagojn, sin frapante kontraŭ la bordoj. La pejzaĝoj profunde impresas la rigardantojn kaj altiras al si multajn turistojn.

# Petrolurbo e

Teksto de LI LIANG

Fotoj de LIU SIGONG

**K**UN enigmoj de la antikva urbo Loulan ni daŭre vojaĝis laŭ la lasta parto de la Silka Vojo en Ĉinio. Ĝi, laŭlonge de la suda rando de la dezerto Taklimakan, estas la suda branĉo de la Silka Vojo. Laŭ ĝi troviĝis la antikva urbo Milan kaj la regnoj Qimeo (Ĉjemo), Jingjue (Ĝingĝjue) kaj Yutian. Kvankam prosperaj siatempe, ili ĉiuj malaperis antaŭ tre longe kiel Loulan. Nun etendiĝis antaŭ ni 337 000-kvadratkilometra Taklimakan, la dua granda dezerto en la mondo. En la ujugura lingvo Taklimakan signifas, krom “maro de morto”, ankaŭ mal-


multe konatan “kaŝejon de trezoro”. Nun estas tempo malkovri ĝian misteron.

## ŜOSEO TRA LA DEZERTO

Konstruado de ŝoseo tra la dezerto por serĉi trezoron povas esti rigardata kiel miraklo, kiu estis eĉ neimagebla por antikvuloj. Ni eniris la dezerton laŭ tiu 523-kilometra ŝoseo, kiu inaŭguriĝis en la dua duonjaro de 1995.

Nia aŭto rapide veturis en la dezerto. Sub la kruela suno la ŝoseo odoris je asfalto kaj aspektis pli nigra kaj pli longa. De tempo al tempo







# n dezerto

kamionaro veturis renkonte al ni kun granda bruo kaj reciprokis saluton per kelka fajfado. Post tio, denove estis silento. Ambaŭflanke de la ŝoseo, je 30 m for de ĝi, fragmitoj plantitaj en kvadratoj jam velkis kaj reverdiĝos nur en la venonta pluva sezono. Tiuj fragmitoj kaj nigraj retaĵoj pli malproksime de la ŝoseo kune protektas ĝin kontraŭ sablo. Pli fore furiozis kirlovento, kiu kvazaŭ drako spirale leviĝis al la ĉielo. Ĉe la horizonto ŝajne verdis arbaro, ŝajne ondis maro aŭ lago. Nur kiam ni proksimiĝis al ili, la spektaklo reaperis. Tio estis miraĝo.



SKEMA MAPO DE LOKOJ ĈE SILKA VOJO







Putoboristoj en laboro





Putobora skafaldo en la dezerto

### La petrolurbo



La dezerto ne plu silentas.



Post ventego



La konstru-kosto de tiu ŝoseo estas, laŭdire, la plej alta en Ĉinio. Oni elspezis almenaŭ milionon da juanoj (unu usona dolaro = 8.2 juanoj) por ĉiu ĝia kilometro. La konstruantoj el 17 entreprenoj de la lando finkonstruis ĝin en du jaroj kaj tri monatoj, venkinte teknikajn malfacilojn unu post alia.

## SERĈI TREZORON EN LA DEZERTO

Vere, en la dezerto Taklimakan sin kaŝas trezoro. Ĝi estas petrolo.

Antikvaj vojaĝantaj komercistoj penis eviti tiun moviĝeman dezerton, la plej grandan en la mondo, sed nun oni jam eniris en ĝian centron kaj konstruis tie urbon.

Post sesjara prospektorado oni konstatis, ke en la baseno Tarim sin kaŝas 20 miliardoj da tunoj da nafto kaj gaso.

Tio allogis petrolistan armeon al la dezerto. En la 90-aj jaroj Ĉinio decidis ekspluati petrolkaj gaskampojn en sia okcidenta parto. Tiuj, kiuj partoprenis

la konstruadon de la petrolkampo en orienta Ĉinio dum la 50-aj jaroj, diris, ke siatempe por ekspluati la petrolkampon, tien venis sennombraj homoj, sed nun oni adjudikis la ekspluaton. Krome, viglas ankaŭ alilandaj investoj, destinitaj ĉefe por kuna ekspluatado, fundamenta konstruado kaj importado de avangardaj ekipaĵoj.

Post dekjara prospektorado kaj ekspluatado estiĝis petrolkaj gaskampoj en la baseno Tarim, kaj unu el ili estas la petrolkampo Tazhong (Taĝong) kuŝanta en la sino de la dezerto.

Kiam nin enuigis la monotona koloro de la dezerto, nia aŭto eniris en vojforkon. Post kiam ni transiris kelkajn sablajn deklivojn, aperis antaŭ ni vasta ebenejo: ĉe unu flanko de la ŝoseo estas 7-8 cementitaj korbopilakaj ludejoj, sur kiuj vidiĝas signoj por surteriĝo de helikoptero, ĉe kiuj bonorde staras vico da grandaj cisternvagonoj kaj konteneroj, kaj ĉirkaŭ kiuj estas ramita sablotereno. Tie senorde kuŝas dekoj da barako-

vagonoj. Sur la tegmento de trietaĝa fabrikdomo pli fore, flirtas ruĝa flago kun kvin steloj. Sur altaĵo aliflanke de la ŝoseo estas aviadila kurejo farita el fera plato. Ĉiutage al la petrolkampo flugas du malgrandaj aviadiloj por transporti provianton.

La barakovagonoj klimatizitaj estas ofte vidataj “konstruaĵoj”. En ĉiu el ili eblas loki kvar litojn kaj du tablojn. Ankaŭ kiel nia “hotelo” servis tia vagono. En la petrolkampo Tazhong oni uzas ilin ne nur kiel loĝejon, sed ankaŭ kiel oficejon, restoracion, vendejon, barbirejon kaj duŝejon.

Tie estas nur unu vendejo, en kiu aĉeteblas ĉiuj ĉiutagaj bezonaĵoj, escepte de vino. Ni vidis malmultajn klientojn en la vendejo.

Vespere ni intervidiĝis kun ĉefrespondeculo Gu Renzhang (Gu Ĵenĝang). De li ni informiĝis, ke la rezervokvantoj de nafto kaj gaso en Tarim konsistigas respektive 1/7 kaj 1/4 de tiuj de la tuta lando. En la lastaj dek jaroj en la petrolkampo Tazhong konstruiĝis 118 petrolputoj de ĉiaj tipoj de Ĉinio.

“Nun en la petrolkampo laboras trimil homoj kaj la jara produktokvanto de nafto superas kvin milionojn da tunoj,” li diris.

Menciente la perspektivon, li montriĝis memfida:

“Post ekfunkciado de la granda petrolo kaj kemiindustria fabriko ni multe altigos la naf-totraktan kapablon. Nun jam finkonstruiĝis 304-kilometra olekaj gasdukto. La ŝoseo tra la dezerto ne plu funkcias kiel petroltransporta arterio. Eston-



Sur flugkampo en la dezerto

te, ni konstruos alian ŝoseon en orienta-okcidenta direkto.”

Aŭskultinte, mi laŭdis, ke ili kreis miraklon. Sed s-ro Gu diris: “Vere laŭdindaj estas laboristoj sur la petrolkampo.”

## PUTOBORA TAĈMENTO N-RO 60148

La putobora taĉmento n-ro 60148 respondecis pri borado de la puto n-ro 162 en la petrolkampo Tazhong. La puto distancas de la komandejo je pli ol 20 km.



Eksperimentejoj de kreskaĵoj

Preskaŭ duono de la vojo de ĝi al la komandejo estis ankoraŭ ne asfaltita kaj sur ĝi energie lăboris vojkonstruantoj.

La pli ol 30 putoboristoj de la taĉmento n-ro 60148 venis el Sichuan-provinco. Evidente ili ne kutimiĝis al la tiea klimato: Somere la temperaturo atingas eĉ 75°C kaj vintre ĝi malleviĝas al 34°C sub la nulo, krome, la taga kaj nokta temperaturoj ege diferencas. Tamen tio ne fortimiĝis ilin.

En la vertikala puto borata de ili abundis hidrogena sulfido. Do, oni devis enverŝi en ĝin akvon kaj forbruligi la superfluan gason elkondukitan el ĝi. Dum pli ol du monatoj ili jam boris pli ol kvarmil metrojn.

“Bonege!” mi laŭdis.

“Tio estas nenio. Niaj samprovincanoj de la taĉmento n-ro 60146 jam boris 7.5 mil metrojn. Ilia puto estas la plej profunda en Azio.”

Tiuj petrollaboristoj diris al mi, ke ĉiujare ili havas sesmonatan libertempon por viziti la familianojn. Menciante hejmon, iu pli-ol-50-jara inĝeniero diris kun emocio: “Antaŭe mi neniam sentis la hejmon tiom varma kaj kara kiel nun.”

Tamen ili ne plendis pri tio. Ili diris, ke ili ĉiuj venis tien volonte kaj devas labori diligente malgraŭ forta sopiro al hejmo.

Du monatojn poste, kiam nafto ŝprucos el la puto, ili forigos la platformon, instalos oledukton kaj pumpilon por konduki nafton al la kvara laborkvartalo de

la petrolkampo.

Antaŭ domo simila al trista hotelo en tiu ĉi kvartalo kuŝas granda placo, ĉe kiu verdas herboj kun belaj floroj, kaj vojetoj kondukas al eleganta ĝardeno en stilo de suda Ĉinio. Ekster la ĉirkaŭmuro etendiĝas strato, ambaŭflanke de ĝi prosperas tamarikoj, kaligonoj (*Calligonum mongolicum*) kaj aliaj arboj. Ĉe la ekstremo de la strato estas nemalgranda moderna fabriko. Tie bonorde staras cilindraj ŝtalaj konstruaĵoj, interligitaj per multaj tuboj. Meze sidas konstruaĵo kun malhelblua vitro.

La fabriko povas trakti ĉiujare 2.5 milionojn da tunoj da nafto. Tie funkcias ankaŭ aŭ-

tomata regadejo de internacia nivelo de la 90-aj jaroj, 42 petrolputoj kaj ole-stacio kun jara kolekta kapablo de 900 mil tunoj.

Tie laboras nur 51 gejunuloj kun meza aĝo de 26.6 jaroj.

Li Ping kaj Hong Yujian (Hong Juĝjŭan), du el la kvar virinoj de la laborejo, venis tien respektive en 1996 kaj 1997, diplomiginte el petrolo instituto.

Virinoj laborantaj sur la petrolkampo Tazhong estas malmultaj. Oni malfacile povas imagi la rilatojn inter la furiozeco de dezerto kaj la mildeco de virinoj. Homoj, kiuj longe vivas en dezerto, fariĝas incitigemaj kaj koleremaj kun kruda haŭto. Ĉu tiuj virinoj povas kutimiĝi al tio?

“Kompreneble, inter revo kaj realo estas granda distanco. Mi iam havis revon kaj strebis al ĝia realiĝo, kaj en la revo kunfandiĝis ĝojo kaj malĝojo. Mi ne bedaŭras mian elekton,” Li Ping diris kviete.

“Mi iam ploris. Sopirante pri la hejmo, mi malĝojas. Mi preferas larmi ol vivi banale,” Hong Yujian konfesis malkaŝeme.

“Tre lacaj, ĉiutage ni plej deziras dormi profunde,” ili preskaŭ samtempe diris al mi. Fakte, ili ofte sin amuzas per ludo de karto, tabloteniso, bilardo kaj eĉ naĝo. Tie ili, kvankam rigardataj kiel “prinĉinoj”, ne estas dorlotataj. Kiel tamarikoj en dezerto, ili alportas al tiu vira mondo virinajn ĉarmon kaj tenerecon. Se mankus ili en la taĉmento, certe perdiĝus forta allogo por serĉi trezoron en la dezerto. ■



Vivforto


Verdajo en la dezerto




Poploj (*Populus diversifolia*) en la dezerto







Ŝoseo tra la dezerto



Retajo kontraŭ sablo



Voljriparistoj

# Defianto de la tabua zono de la vivo

**M**ATENO. Streĉeco regis en la operaciejo de Tiantan-hospitalo de Pekino: Tri malfacilaj operacioj de cerbomo estis farotaj de prof. Wang Zhongcheng (Ŭang Ĝongĉeng).


Je duono post la naŭa li venis en la kabineton kaj tri grupoj komencis sin prepari por la operacioj. Je duono post la deka li eniris la operaciejon. La ĉefflegistino diris: "Ni devas fari la operaciojn senpaŭze ĝis la tria aŭ kvara posttagmeze."

Laŭ sia aranĝo, Wang Zhongcheng servas en la ambulatorio lunde kaj faras almenaŭ du operaciojn ĉiutage de mardo ĝis vendredo. La cerbo, ŝlosilo de la vivo, gvidas spiron, korbato kaj konscion. Tial, medicine, ĝi estas rigardata kiel tabua zono de la vivo. Prof. Wang Zhongcheng estas defianto de la tabua zono kaj atingis sukcesojn.

## REKORDULO DE 10 000 NEŬROKIRURGIAJ OPERACIOJ

En 1952 estis starigita en Ĉinio fako de encefalopatio, al kiu mankis lernolibroj, specimenoj kaj aparatoj. Wang Zhongcheng, nove

elbakita en universitato, komencis dismembri kadavron, fari vaskul-punkcion kaj ekzameni malsanulojn per iks-radioj. Sep jarojn poste, li jam havis 2 500 radiografaĵojn de cerbaj vaskuloj kaj verkis la fakan libron "Ra-




Prof. Wang Zhongcheng donas konsultiĝon.

diografio de Cerbaj Vaskuloj", la unuan neŭroradioaktivan verkon en Ĉinio, tiel ke la procentaĵo de misdiagnozoj de encefalopatio reduktiĝis de 1-2% ĝis 0.1-0.2%. Tamen, pro longtempa influado de iks-radioj, la kvanto de liaj leŭkocitoj fariĝis duono de la normala, tial li ofte febris. Foje pulmito preskaŭ perdigis al li la vivon. Li diris: "Kiel kirurgo, mi bone scias, ke mia laboro negative influas mian sanon, sed por kuraci pacientojn mi havas neniun alian elekton."

Mikrokirurgia operacio kaŭzas malseriozan difekton al cerbaj histoj de suferanto kaj li aktive praktikas ĝin klinike. Ĉinio estas lando kun multaj suferantoj de cerba aneŭrismo. Sekve de tio, li studis pri ekscizo kaj prezentis serion da projektoj kontraŭ granda aneŭrismo. En la mondo nur kelkaj kirurgoj faris po milon da operacioj de aneŭrismo kaj prof. Wang Zhongcheng estas unu el ili. Pli ol 300 suferantoj de tumoro de cerba trunko estis savitaj de li. En la lastaj jaroj li neis la tezon, ke ne eblas fari operacion de granda tumoro en supranuka mjelo, kaj faris tian operacion al 120 malsanuloj kaj neniu el ili paraliziĝis.

Dum dekoj da jaroj prof. Wang Zhongcheng sukcese faris 10 000 neŭrokirurgiajn operaciojn, publikigis 270 disertaciojn kaj eldonis 20 fakajn librojn. Tiantan-hospitalo de Pekino kaj la Neŭrokirurgia Instituto de Pekino, gvidataj de li, estas konataj kiel unu el la tri centroj de neŭrokirurgio en la mondo kaj kiel centro de kunlaboro inter Ĉinio kaj la Monda San-Organizo por trejni fakulojn. Sub lia gvido estas starigitaj la ĉina reto de neŭrokirurgio, tiuf flankaj malsanulaj ĉambroj en



Prof. Wang Zhongcheng (meze) operacianta

provinc-nivelaj hospitaloj kaj tiuflanka kliniko en hospitaloj de mezgrandaj urboj. La nombro de ĉinaj neŭrokirurgoj kreskis de pluraj al pli ol 6 000. Li estas ricevinto de Kembriĝa Ordeno, li estis honorita dufoje de Usono kiel jara eminentulo de la mondo kaj laŭdita de japanaj neŭrokirurgoj kiel korigo de la aziaj neŭrokirurgoj.

## TUTANIME POR SUFERANTOJ

Prof. Wang Zhongcheng kuracas kaj ĉinajn gvidantojn kaj ordinarajn popolanojn sendistinge de rango. En la okuloj de ĉinaj popolanoj li estas nobla persono kun alta kuracarto. En la pasintaj

47 jaroj li faris 10 000 operaciojn. Jene estas liaj kortuŝaj agoj.

Foje suferanto de granda metencefala tumor petis lian helpon. Malfermite la kranion, prof. Wang Zhongcheng timiĝis, ĉar li neniam vidis tian vaskulabundan tumoron, kia ĝi. Ĉie en la cerebela interkruciĝis mikrovaskuloj, kiuj ligiĝis kun la cerbo-trunko. Se la profesoro ektuŝus cerbo-trunkajn nervojn pro eta senatenteco, tio malsukcesigus la operacion. La laboro daŭris de la mateno ĝis la mezo de la sekva tago. Dumtempe liaj kolegoj konsilis al li ripozi, sed li rifuzis tion. Post la operacio li grave malsaniĝis.

Aliffoje, iu pli-ol-60-jara maljunulo baris al li la vojon kaj surgenu petis lin savi lian filon. Je tio la maljunulo elpoŝigis monbiletojn kaj diris, ke li genuos, ĝis Wang akceptos la monon. Embarasite, la profesoro konsentis. Poste li faris operacion al la filo de la maljunulo. Dum la operacio la tumor krevis kaj la filo ĉesis spiri. La profesoro senhezite malfermis la kranion de la suferanto kaj per mano faris al li hemostazon. Fine li sukcesis detranĉi tumoron kun diametro de naŭ centimetroj. Li ŝanceliĝe eliris el la operaciejo kaj diris al la maljunulo atendanta ekster la pordo: "Estu trankvila! La operacio sukcesis." Li redonis la monon al la maljunulo, kaj ĉi tiu kun larmoj diris: "Vi estas savanto, d-ro Wang!"

Junulo Fan Jun (Fan Ĝjun) suferis de granda intramjela tumor. Li, 1.80 m alta sed malpli ol 45 kg peza, havis serioze atrofitaĵojn muskolojn. Liaj familianoj venis al Wang por peti lian helpon. Konsultinte la radiografajojn, li diris: "Granda risko por la operacio, sed espero por sukceso." Jen komenciĝis la operacio. La tumor estis en la mjelo plena de vaskuloj kaj li bone pripensis ĉiun tranĉon. La operacio daŭris sep horojn kaj fine li sukcesis detranĉi la 22 cm longan tumoron de la mjelo. Post resaniĝo Fan Jun eklaboris en kompanio.

Je mencio pri ĉio ĉi prof. Wang diris: "La sukcesoj de kuracisto dependas de malsanuloj. Kompreneble, li devas tutkore servi al ili." Li, famulo, kondutas kiel antaŭe: Kvankam silentema, li elbuŝigas torenton da vortoj pri sia laboro; ĉiutage li laboras almenaŭ 12 horojn, kaj se eble, li certe rigardos pilkludon; li ĉiam strebas por perfektigi la kuracarton; kaj li neniam estas elektema je manĝo kaj vesto. En la pasinta jaro lia edzino vizitis la filon eksterlande. Kaj li ofte manĝis tujvermiĉelojn dum duonjaro. ■



# 760 milionoj da ĉinoj en balotado

**L**A balotado de 760 milionoj da ĉinoj celis elekti popolajn reprezentantojn, kaj samtempe, estrojn kaj vicestrojn de la 50 000 distriktoj kaj urbejoj de Ĉinio. La Tutlanda Popola Kongreso estas la plej alta organo de ŝtatpotenco de Ĉinio. Estas popolaj kongresoj de provincoj kaj gubernioj, kaj ankaŭ tiuj de distriktoj kaj urbetoj, kiuj estas la plej bazaj. Laŭleĝe, ĉiuj popolaj kongresoj, en kiuj la ĉinoj plenumas la ŝtatpotencon, devas esti naskitaj post demokratia balotado.

Eble iuj legantoj ankoraŭ memoras la artikolon “Balotado de kamparanoj pri vilaĝestreco” en la 9-a numero de EPCĈ, 1996. Kvankam elekto de vilaĝestro estas tre grava por la kamparanoj, tamen la vilaĝa komitato estas aŭtonoma organizo, sed ne loka registaro. Balotado pri reprezentanteco de la popolaj kongresoj de distriktoj kaj urbetoj estas politika en la vera senco de la vorto, kiu spegulas la progreson de demokratio en Ĉinio.

## ELEKTADO KUN PLI DA KANDIDATOJ

Februare de 1995 ekpraktikiĝis la reviziitaj “Leĝo pri Elektado” kaj “Leĝo pri Lokaj Organizaĵoj” de Ĉinio, laŭ kiuj iris la balotado de 760 milionoj da ĉinoj, kiu komenciĝis en la lasta duono de 1995 kaj daŭris 20 monatojn.

Okazis granda ŝanĝiĝo en la balotado — ĉi-foje plenumiĝis elektado kun pli da kandidatoj. Venis informo el la gubernio Kangxian de Gansu-provinco: En la balotado pri estreco kaj vices-treco de la distrikto Tongqian (Tongĉjan), la tri kandidatoj re-

komenditaj de la supera instanco ne sukcesis en elektado. Kaj la kandidatoj rekomenditaj de la popolaj reprezentantoj sukcesis kun pli multe da balotiloj. Tio malofte okazis en la pasinteco kaj sensaciis en la gubernio.

En elektado kun pli da kandidatoj ofte okazas, ke iuj kandidatoj malsukcesas en ĝi. Oni atentis la balotadon en Tongqian ne pro tio, ke iuj kandidatoj ne sukcesis, sed pro tio, ke oni balotis por la kandidatoj rekomenditaj de la popolaj reprezentantoj. Post praktikado en multaj jaroj la plejparto de la popolanoj aprobas elektadon kun pli da kandidatoj por popola reprezentanto, tamen estas iagrade malsamaj opinioj pri elektado de oficistoj de la registaro en la maniero supre menciita. En la du reviziitaj leĝoj elektado kun pli da kandidatoj estas difinita kiel baza principo. Ĝenerale la prezidantaro de popola kongreso rekomendas nombron da kandidatoj egalan al la bezonata, kaj la marĝenon rekomendas la popolaj reprezentantoj. Antaŭe ĉiuj kandidatoj estis rekomenditaj de superaj instancoj, kio iel malhelpis al la popolaj reprezentantoj plenumi sian rajton.

Por garantii demokratian, justan kaj malkaŝan balotadon, lokaj popolaj kongresoj aplikis diversajn principojn. Ekz. antaŭe en Jiangsu-provinco, se kelkaj reprezentantoj kune rekomendis kandidatojn laŭleĝe, oni rigardis tion kontraŭleĝa kaj sendisciplinana. Kaj nun estas preskribite, ke tia rekomendo estas laŭleĝa; la kandidatoj, rekomenditaj de la prezidantaro de popola kongreso kaj de popolaj reprezentantoj, havas tute egalan rajton; kaj se

kandidatoj rekomenditaj de la prezidantaro ne sukcesis en balotado, tio estas normala. Tiuj preskriboj ne estas senkaŭzaj. Dum elektado okazis, ke, se la kandidatoj rekomenditaj de popolaj reprezentantoj sukcesis en balotado, tio ne estis agnoskita. Nun ŝanĝiĝis la situacio. En iu urbeto de Guangdong-provinco, la prezidantaro de la popola kongreso rekomendis unu kandidaton kaj la reprezentantoj — du. Fine, tiu rekomendita de la prezidantaro estis elektita kiel vices-tro kaj unu el tiuj rekomenditaj de la reprezentantoj — kiel estro de la urbeto.

## ELEKTI SIAJN REPRESENTANTOJN

La reviziitaj “Leĝo pri Elektado” kaj “Leĝo pri Lokaj Organizaĵoj” havas regulojn pri dispozicio de elekto-distriktoj kaj nombro de reprezentantoj. En iuj lokoj oni eĉ limigis la proporcion de partianoj-respondeculoj inter la kandidatoj. Iu respondeculo de loka popola kongreso diris: “Popola kongreso ne estas kunveno de partianoj-representantoj, nek de gvidantoj, nek de direktoroj.” Estas ankaŭ alia ŝanĝiĝo — la nombroj de reprezentantoj de kamparo kaj urbo estas preskaŭ proporciaj al la loĝantoj reprezentataj de ili respektive.

En kamparana domo de Jiangxi(Ĝjangŝji)-provinco oni estis balotantaj por popolaj reprezentantoj. Mi demandis virinon kun infano en la brakoj: “Ĉu por vi la balotado estas pli grava ol zorgado de la infano?” Tuj ŝi respondis: “Kompreneble, mi volas elekti reprezentanton, kiu esprimas nian volon kaj laboras


por ni.” Mi demandis, ĉu la elektado rekte rilatas kun ilia ĉiutaga vivo. Alia vilaĝano senkaŝe respondis: “Se ni bone faros elekton, nia vilaĝo prosperiĝos kaj ni riĉiĝos pli rapide...”

La reprezentantoj havas pli da devosentoj por la balotantoj. Balotanto Luo diris: “Antaŭe oni opiniis, ke popola reprezentanto estas nur nominala. Lia tasko, ŝajne, estas nenio alia krom kunsidi kaj diskuti. Sed nun la popolaj reprezentantoj laboras por la popolanoj. Ekz. iuj montris, ke la vilaĝaj instruistoj havas malaltan salajron, la reprezentanto raportis pri tio dum la kongreso, kaj poste plialtiĝis la salajro de vilaĝaj instruistoj.”

Popola reprezentanto Zhang diris: “Mi havas pli da taskoj post la elekto. Mi havas la devon prezenti la dezirojn kaj opiniojn de la popolanoj, kaj krome, mi ankaŭ devas baloti por estroj de distrikto kaj kontroli ilian laboron.”

## NEEVITEBLAJ PROBLEMOJ

Laŭ materialoj donitaj de la Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio, pli ol 90% de la loĝantoj,



Tibetaj kamparanoj en balotado

kiuj rajtis baloti, partoprenis la elektadon. En la lasta duonjarcento pli perfektigis la konstruado de demokratio kaj leĝa sistemo en Ĉinio, antikva lando, kie regis feŭda reĝimo dum miloj da jaroj. Tio estas tre ĝojiga progreso. Tamen, same kiel multaj aliaj landoj, ankaŭ Ĉinio alfrontas neeviteblajn problemojn, ekz., iuj subaĉetis balotantojn, aliaj perforte malhelpis la voĉdonadon, kaj en malproksimaj regionoj samgentanoj metis obstaklon por malsukcesigi la balotadon.

Kompreneble, estas kontraŭleĝaj la agoj, kiuj malhelpas

leĝan balotadon de la civitanoj. Koncernaj leĝoj de Ĉinio preskribas, ke dum elektado de reprezentantoj de diversnivelaĵoj popolaj kongresoj kaj registoj, se oni perforte minacas, trompas kaj subaĉetas balotantojn, kaj se oni faras falsan dokumenton pri balotado, malordigas la balotadon aŭ malhelpas la balotantojn kaj reprezentantojn plenumi siajn rajtojn elekti kaj esti elektitaj, oni estos punita laŭleĝe. Ekz. en Chongqing, Zhang Zhijun estis elektita kiel vicestro de iu urbeto post subaĉetado. Kiam lia fiago malkaŝiĝis, li estis leĝe punita. ■

(Daŭrigo de p. 15)

Prezo: 8,00 USD Sendokosto: 1,50 USD

### Rateto volas edziniĝi

Komp. Zhao Muying. Trad. Shan Ren. Beijing, 1994. 60p. 18.50x12cm.

La libreto entenas dek unu legendojn pri la trikolora fajencaĵo de Tang-dinastio, la giganta budho en Leshan, la naciaj muzikiloj ĉevalkapa violono kaj dombro, la novjara bildo, argilmodlaĵo, vaksintturaĵo, brodaĵo kaj aliaj.

Prezo: 4,00 USD Sendokosto: 1,00 USD

### Ruĝdoma sonĝo (Volumo I)

Cao Xueqin. Trad. Xie Yuming. Beijing, 1995. 582p.

22x14cm. Ilus. Bind.

Unu el la plej famaj klasikaj romanoj de Ĉinio, kiu priskribas la ruiniĝon de iu nobela familio en la lasta periodo de la ĉina feŭda socio kaj la tragedion de juna amanta paro. La romano prezentas la dekadencan de la ĉina feŭda socio kaj ĝiajn diversajn konfliktojn.

Prezo: 22,00 USD Sendokosto: 5,00 USD

### Ruĝdoma sonĝo (Volumo II)

Cao Xueqin. Trad. Xie Yuming. Beijing, 1996. 684p. 22x14cm. Ilus. Bind.

Prezo: 28,00 USD Sendokosto: 5,00 USD

### Verkoj de Ĵelezo (en la ĉina

lingvo)

Komp. Ĉina Esperanto-Ligo. Beijing, 1995. 500p. 22x14cm. Ilus.

Ĵelezo estis pioniro de la ĉina Esperanto-movado kaj unu el la ĉefaj respondeculoj de la Ĉina Ŝtata Komisiono pri Lingvo. La libro entenas dekojn da disertaĵoj, artikoloj, tradukaĵoj kaj leteroj de Ĵelezo pri la Esperanto-movado kaj reformado de la ĉina skriba lingvo, kiujn li verkis kaj tradukis ekde la 30-aj jaroj. Kiel suplemento, la kronologia tabelo kaj la memoraj artikoloj ebligas pli penetre konatiĝi kun Ĵelezo.

Prezo: 6,00 USD Sendokosto: 5,00 USD

# Efika metodo kontraŭ falso

**L**Aŭ takso de la Organizo de Komerca kaj Industria Proprietoj, la valoro de falsaj kaj malbonkvalitaj varoj konsistigas 2%-5% de la totala sumo de la internacia komerco. Laŭ la sumo kaj influo ili estas la dua katastrofo nur post narkotaĵo-negoco. En Ĉinio oni ofte estas trompita kaj damaĝita de tiaj varoj, iuj eĉ perdis la vivon. Tial, batali kontraŭ la falsaj varoj fariĝis unu el la multe diskutataj temoj. Ĉiujare la ŝtato kaj entreprenoj elspezas multe por tiu laboro. Tiu-kampe altaj teknikoj ludas gravan rolon.

Julie de 1995 la Ĉina Komerca Asocio de Falso-Preventado estis fondita. Kunlabore kun koncernaj ŝtataj departementoj, aplikante diversajn metodojn, ĝi bonordigas la merkaton por defendi la interesojn de fabrikoj kaj klientoj. En la lastaj du jaroj la asocio ekzamenis 17 teknikojn por preventi falson el 14 provincoj kaj municipoj kaj dividis ilin en 6 specojn: kaŝitaj strio-kodoj, tri-dimensiaj bildoj, dufoja presado, lasera hologramo, speciala falso-preventa marko aŭ kodo.

Falso-preventa telefon-kodo verŝajne ne estas alta tekniko, tamen ĝi estas efika. Ĝi estas nekopiebla kaj malmultekosta. La falso-preventa telefon-kodo konsistas el serio da markoj kaj serva sistemo de distingo per falso-preventa kodo. La markoj estas falso-preventa produktaĵo, farita per altteknika preso, kaj povas pre-

venti falson. Ĉiu marko entenas grupon da speciale kaŝitaj falso-preventaj numeroj, kovritaj per speciala tegaĵo. La numeroj entenas koncernajn informojn de la protektata varo, ĉiu numero estas unika kaj unufoje uzebla. La serva sistemo de distingo per falso-preventa kodo konsistas el tutlanda komputilo-monitara serva centro kaj reto de komputila informiĝo. La centro havas informojn de ĉiu produktaĵo de enretigitaj entreprenoj. Tiuj, kiuj volas scii, ĉu la markita varo estas vera aŭ falsa, telefonu per la speciala lineo kaj laŭ sono-sugesto donu numerojn de la varo.

La tekniko karakteriziĝas per la jeno: Unue, unikeco de numero. La numero de la markoj estas unika kaj neregula. Due, sekureco de numero. La numero estas kovrita kaj nevidebla. Tuj kiam la sekreto malkovriĝas, la marko ekvalidiĝos. Trie, la marko estas unufoje uzebla.

Kompare kun aliaj metodoj, ekz. la metodoj laseraj, fluoreskaj, temperaturaj kaj kaŝitaj, la kodo de falso-prevento havas apartan superecon. Dank' al la numero farita per du metodoj de falso-preventado kaj koncerna distinga sistemo, ĝi estas pli avangarda ol tiu de unu metodo. Koncerne la distingon, oni bezonas telefoni por distingi la verecon, sen ekzamenado de fakulo. Koncerne la fidindecon, la numero de la produktaĵo estas unika kaj nefalsebla. Koncerne la administradon,

oni garantias sekurecon de la markoj kaj donas servon por distingo, kaj la kodo de falso-preventado ne nur preventas falson, sed ankaŭ havas funkciojn batali kontraŭ kontrabando, prizorgi atestojn kaj redoni merkatajn informojn.

Antaŭ du jaroj la kodo de falso-preventado estis popularigita tra la tuta lando. Ĝi estis unue ekpraktikata kadre de manĝaĵoj kaj alkoholaĵoj kaj akiris bonan rezulton.

La ĉinoj deziras efikan metodon kontraŭ falso, samtempe Ĉinio penas perfektigi koncernan leĝon. Oni kredas, ke venos la tago, kiam la ĉina merkato ne plu havas falsajn varojn. ■



Falso-preventaj kodoj vaste uzataj en Ĉinio



# Antikvaj pagodoj en Longyan



Pagodo sur “palaco”

**E**N Ĉinio estas pli ol 3 000 antikvaj pagodoj. En Longyan-regiono de okcidenta Fujian-provinco en sudorienta Ĉinio staras kelkaj pagodoj, kiuj ne estas famaj, tamen originalaj.

## PAGODO SUR “PALACO”

La pagodo Zhuangyuan (Ĝuangjūan) havas historion de pli ol 400 jaroj. “Zhuangyuan” en la ĉina lingvo signifas la plej bonan sukcesinton en la kortega ekzameno en feŭdaj dinastioj. Oni konstruis tiun pagodon por memorigi, ke iu lokano iĝis Ĝuangjūan-o. La malsupra parto de la pagodo estas palaco. Kun fundamento el marmoro, la pagodo havas 7 etaĝojn kaj altas ĉ. 40 metrojn. Ĝi spertis kelkajn tertremojn, tamen staras stabile.

La ĉefa halo de la pagodo longas 14.5 m, larĝas 12 m kaj altas 6.5 m. Ene sidas diaj statuoj. La pagodon subtenas kvar kolonoj altaj ĝis ĝia supro. La malsupraj tri etaĝoj estas kvadrataj el ligno kaj tero; la supraj kvar — 8-angulaj el ligno kaj brikoj. In-

ter la 6-a kaj 7-a etaĝoj estas radianta trabaro simila al granda rado, kiu plifirmigas la pagodon. Ties pinto en formo de kalabaso konsistas el porcelanaĵoj ruĝaj, flavaj, bluaj kaj blankaj. Pendas sur la pagodo dekoj da sonoriloj, kiuj ĉarme tintas en vento.

Antaŭ kaj post la pagodo staras respektive granda halo kaj Dengwen-domo, kie antikvaj intelektuloj studis, renkontiĝis kaj prelegis. Proksime estas domoj kun 30 ĉambroj kiel defendantoj. La pagodo situas inter verdaj montoj kaj ĉe klara rivereto. Jen tre vidinda pitoreskejo.

## PAGODOJ SUBTERAJ

En Longyan estas du pagodoj subteraj, kiujn oni nomas “Jinpagodoparo”. Unu el ili profundas 16 metrojn kun supra parto pli larĝa ol la malsupra. Ĝi similas al ŝtona pagodo surtera. Akvo filtriĝinta tra la muro kolektiĝis sur la fundo de la pagodo kaj similas al 8-angula spegulo. Cirkulas legendo, ke en la subtera pagodo kaŝiĝas drako, kiu ellasas akvon, tiel la akvo en la pagodo neniam

sekiĝas kaj estas tre dolĉa.

La alia pagodo kun malsupra parto pli larĝa ol la supra kvazaŭ translokiĝis sub la teron. Estas ankaŭ akvo en la pagodo. Antaŭ ĝi staras ŝtona monumento, sur kiu klare videblas epigrafo.

Inter tiuj du pagodoj estas distanco nur 100-metra. Laŭ esploro, la unua konstruiĝis en Tang-dinastio (618-907), kaj la alia en Song-dinastio (960-1279). Lokanoj diras, ke antikvuloj konstruis ilin kun la espero, ke prosperos tie literaturo kaj homaj sciencoj.

## PAGODO SUR PONTO

La pagodo Longmen staras sur ponto. Laŭdire, en la jaro 1586 guberniestro Wu Shouzhong lanĉis monokolektadon por konstrui ponton, por ke la popolanoj facile transiru la riveron. La posteuloj konstruis la pagodon sur la ponto dezirante, ke la lokanoj havu pli da mono. La 8-angula pagodo kun kalabaso-forma pinto havas tri etaĝojn kaj altas 9 metrojn. Sur muro de la teretaĝo vidiĝas pentraĵoj, kiel tiu pri ok feoj transirantaj maron. Sur la pordoj kaj fenestro-kradoj de la dua kaj tria etaĝoj estas belaj orumitaj gravuraĵoj pri drako kaj fenikso.

## PAGODO EN RIVERO

La pagodo Tingxiu (Tingŝiŭ) sin fundamentas en la kunfluejo de du riveroj de Longyan. Ĝi malrapidigas la du akvofluojn. Ĝi, el brikoj, ĉ. 27 metrojn alta kaj 8-angula, havas sep etaĝojn. En ĉiu ĝia etaĝo estas kvar arkaj pordoj. Ĝia bazo similas al ŝipo. Ĝi larĝas 6 metrojn kaj longas 25 metrojn. En ĝi estas multaj skribaĵoj de literaturistoj de diversaj dinastioj. Inter ili estas tre valoraj kaligrafiaĵoj.

La pagodo Tingxiu ekkonstruiĝis en la jaro 1581. Nun oni vestis ĝin per ornamaj lampoj. Kiam vesperiĝas, la pagodo radias belan lumon, kaj samtempe brilas ankaŭ la riveretoj. ■

# Ĉe la Malpermesita Urbo

de WANG YAO

Pekino, la ĉefurbo de la Ĉina Popola Respubliko, estas urbo antikva kaj samtempe juna.


En la urbocentro staras la impona Imperiestra Palaco, alinome, Malpermesita Urbo. En 1406-1420, imperiestro de Ming-dinastio asignis grandegan sumon por konstrui la grandiozan palacon kun areo de 720 000 kvadrataj metroj.

En la okuloj de la ordinaraj loĝantoj la Malpermesita Urbo estis simbolo de mistero kaj majesto.


Nun jam ne troviĝas la imperiestroj kaj la Malpermesita Urbo fariĝis fama turisma loko. Ekster ĝiaj muroj dekelkajn metrojn altaj fluas urboprotekta rivereto. Pekinanoj faris la ĉriveran lokon ripozejo kaj amuzejo for de la urbega bruado.

Se vi iras tien en la matena aŭ vespera krepusko, vi certe vidas homojn, kiuj seri-oze kantas pekinan operon, akompanate de muziko ludata per kord-instrumento *ĝinghuo*, renkontas tiujn, kiuj kun trankvila mieno faras *tajĝiĉuan*-ekzer-cadon, maljunulojn, kiuj ludas ĉinan ŝakon, junajn gepatrojn, kiuj promenas kune kun sia infano, gajajn knabinojn, kiuj saltas trans ŝnuro, junajn geamantojn, kiuj ameme flustras unu al la alia...

Pekino estas antikva pro la Malpermesita Urbo kaj ankaŭ juna pro la vigla vivo ekster ĝiaj muroj.



“Vidu, kiu veturilo pli plaĉos!”



Ĉiu havas sian propran lertecon.



Ekzercado en mateno



Geknaboj saltantaj trans kaŭĉukan ŝnuron



# Gazeto “Malgranda Mastro” kaj ĝiaj malgrandaj mastroj

**Ĝ**I estas neordinara gazeto, ĉar ĝiaj laborantoj estas infanoj de Ŝanhajo. Tamen rigardu ĝian konsiston: sekcioj de redaktado, de belarto kaj fotografio, de radio kaj televido, de komputado, de interkomunikado ktp., tute same kiel aliaj gazetoj. Ĉi tie infanoj faras intervjuojn, redaktadon kaj fotografon. Ili estas ĉefredaktoro, raportistoj kaj verkantoj. 14 jarojn post la apero de la gazeto ĝia eldon-kvanto atingis 1 000 000. La antaŭa malvasta redakcejo fariĝis alta domo. Parolante pri la deziro fondi la gazeton, direktoro Zhu Jieshi (Ĝu Ĝjeŝi) diris, ke kiel instruisto de kelkdek jaroj, li bone konas infanojn. Kiam infanoj kune laboras, ilia saĝo estas tre miriga, estas facile por ili kompreni unu alian kaj interkomuniki. En 1983 ekzistis multaj infanaj gazetoj eldonataj de plenkreskuloj, tamen li firme kredis ke sub gvidado de plenkreskuloj, eldonado de gazeto fare de infanoj certe estos bona al samaĝuloj. Li diris ankaŭ: “La plej granda sukceso de la gazeto estas kredi infanojn.”

En sekcio de fotografio junaj raportistoj portis veŝtojn kun multaj poŝoj surbruste kaj surdorse kaj pezan fotilon sur la kolo. Zheng Ziyu, kvankam nur 6-jara, estis sperta en intervjuo. Li diris, ke antaŭ intervjuo oni devas bone sin prepari, dum intervjuo oni devas esti ĝentila kaj kuraĝa.

Maje de la lasta jaro Kofi Annan, ĝenerala sekretario de UN, kaj Jacques Chirac, prezidento de Francio, unu post la alia vizitis Ŝanhajon, kaj Zheng Ziyu faris intervjuojn. Li vigle kuris inter raportistoj por foti, jen kaŭrante jen starante eĉ sur seĝo, Annan kaj Chirac estis ĝojigitaj. S-ro Annan laŭdis: la knabo estas brava!

En 1988 kaj 1989 la gazeto renkontis krizon de papero. La eldonado de dekelkaj ĵurnaloj kaj gazetoj prokrastiĝis. “Malgranda Mastro” donis mesaĝon al junaj legantoj. Post nelonge multaj leteroj flugis al la redakcejo. Iu juna leganto skribis: “Kiam mi falis kaj vundiĝis, mi ne ploris, tamen kiam mi legis la mesaĝon, mi malĝoje larmis. La gazeto estas eldonata de ni infanoj mem kaj ĝi estas nia intima amiko. Mi kaj miaj kunklernantoj ŝparos monon por helpi ĝin. La gazeto devas daŭre ekzisti.” Junaj legantoj donis konsilojn, ankaŭ plenkreskuloj donis helpojn, finfine post 4 numeroj la gazeto denove estis publikigita.

Post la krizo la malgrandaj mastroj maturiĝis. Ili ne nur eldonas la gazeton, sed ankaŭ starigis en radio programon “Voĉo de malgrandaj mastroj”, en televido rubrikon “Malgrandaj mastroj” kaj ĵurnalisman lernejon de malgrandaj mastroj. La redakcio fariĝis ĵurnalisa kaj eduka organizo, kun gazeto, radio, televido kaj lernejo.

En gazetara konferenco, okazigita de junaj



Juna ĉefredaktoro kaj ŝia gazeto “Malgranda Mastro”



Malgranda raportisto intervjuas s-ron Kofi Annan.

raportistoj, iu demandis: "Kiel aperis via ĉefredaktoro?" Juna ĉefredaktoro respondis: "Unue, ni elektas, poste ni ekzamenas. Ni ĉiuj komencas laboron de legado de leteroj kaj registro de ar-

tikoloj. Poste laŭ kapablo oni fariĝas redaktoro aŭ paĝo-aranĝisto, kaj fine post ekzameno aperas ĉefredaktoro." "De kie venas informoj?" La juna ĉefredaktoro diris: "Nia gazeto havas du specojn enhave: sinteza kaj resuma. La sinteza publikigas artikolojn verkitajn de infanoj malpli ol-15-jaraj, inter kiuj estas novaĵoj, verkaĵoj kaj literaturaĵoj. La resuma publikigas artikolojn el aliaj gazetoj kaj ĵurnaloj resumitajn de infanoj." Kiam ni aŭdis ke junaj raportistoj emeritiĝas 15-jaraj, ni ridis.

Menciinde, decembre de 1995, 10 junaj raportistoj vizitis Japanion. Tio estis unua fojo por ili vojaĝi eksterlanden. En Tokio kaj Osaka ili vizitis kaj intervjuis 10 tagojn. En infanĝardeno kaj lernejo ili ludis, studis kaj kunvenis kune kun japanaj infanoj. En universitato ili demandis pri eduko de japanaj junuloj. Japanaj plen-kreskaj ĵurnalistoj diris: "Vi faris malfacilajn sed bonajn demandojn".

Infanoj donis la nomon "Malgranda Mastro" al sia gazeto. Ĉiuj pene laboras por fariĝi mastroj. La artikoloj kaj la fotoj riĉigas ilian vivon. Nun iuj el ili studas en universitato, kaj aliaj fariĝis profesiaj raportistoj. Kiam ili rememoras sian infanecon, ili ne forgesas la travivaĵojn en la redakcio. ■



Zheng Ziyu kaj franca prezidento Jacques Chirac



# Iom pri akciuloj kaj akcia merkato

de JIN RONG

**S**UN Yueqing estas ordinara akciulo. En 1993 li aĉetis akciojn per 100 000 juanoj, la tuta sumo de sia familio. En la sekvantaj jaroj, kvankam la valoro de akcio jen leviĝis jen malleviĝis, tamen, ĝenerale dirite, la akcia kurzo tendencis al malleviĝo, tial en la akciado Sun multe malprofitis. "Tiam mi ĵuris, ke en mia vivo mi neniam plu partoprenos en akciaj aferoj." Malgraŭ tio, li ne retiris sin el la akcia merkato.

En tiuj jaroj la akcia merkato estis forta allogo, precipe por junuloj. La kaŭzo kuŝis ĉefe en tio, ke la akcioj malaperis en Ĉinio jam antaŭ pli ol 30 jaroj. Nur en 1990 la ĉina registaro decidis starigi akcian merkaton por ekspluati la

novan distrikton Pudong de Ŝanhajo kaj delton de Yangzi-rivero kaj solvi la financon malfacilon en la ekonomia konstruado. Tiam akciado estis afero kaj freŝa kaj fremda por multaj ĉinoj. Oni sin ĵetis en la akcian merkaton kun diversaj celoj: iuj por provado kun scivolemo, aliaj por rapida riĉiĝo, nur tre malmultaj konis la akcian merkaton, tial ili ege ĝojiĝis, kiam ili multe gajnis, kaj dronis en granda malĝojo, kiam ili multe malprofitis. Se ili aĉetis akciojn per sia propra mono, tio ne tre gravis. Kaj se per mono prunteprenita, do la atako fariĝis neeltenebla. Iuj eĉ sin mortigis. Kompreneble, ankaŭ estis tiuj, kiuj pacience atendis la leviĝon de la kurzo. Dum la praktikado la ak-

ciuloj iom post iom akumulis sci-ojn kaj spertojn pri la akcia merkato kaj sekve multaj el ili povas teni sin trankvilaj antaŭ la leviĝo kaj malleviĝo de akcia valoro. Kiam Sun parolis pri la akcia merkato, oni povis vidi en li sobrecon kaj maturecon. Li diris: "Akciado estas investo en modo. La ĉina akcia merkato disvolviĝanta donas multe da ŝancoj por profitego. Se oni ankoraŭ hezitus, do perdiĝus la ŝancoj."

La procezo de la maturiĝado de la ĉinaj akciuloj montras ankaŭ tiun de la disvolviĝo kaj maturiĝo de la ĉina akcia merkato. Ekde la komenco de la 90-aj jaroj ĝis hodiaŭ enmerktiĝis sume pli ol 700 akciaj kompanioj. En 1996 la totala valoro de la akcioj





## o de Ĉinio

de la enmerkatiĝintaj kompanioj konsistigis pli ol 1/4 de la nacia produktovalor. Jam formiĝis la tutlanda akcia merkato regata de la reto de satelita komuniko. Valorpaperaj borsoj nun vidiĝas ne nur en Ŝanhajo, Shenzhen kaj Pekino, sed ankaŭ en multaj aliaj grandaj kaj mezgrandaj urboj de Ĉinio. Nun ĝi nombras 33 milionojn da akciuloj, al kiuj servas multaj specialaj telefonaj lineoj, televidaj kursoj pri valorpaperoj kaj multaj gazetoj kaj ĵurnaloj tiurilate.

La ŝanĝiĝo de la akcia merkato strikte rilatas al la ŝtataj financaj politikoj kaj ekonomia disvolviĝo. Tio postulas, ke la akciuloj devas ne nur fiksi sian rigardon sur la kurzo de la akcia

merkato, sed ankaŭ doni pli da atento al la koncernaj politikoj de la ŝtato kaj ĝia ekonomia konstruado. De aprilo de 1996 Ĉinio plurfoje mallevis rentumon de la bankoj kaj sekve de tio multe da mono torentis en la akcian merkaton, kio refoje levis ĝian kurzon. En la jarfino la kurzo de la akcia merkato leviĝis 2-oble kaj 4-oble respektive en Ŝanhajo kaj Shenzhen, kompare kun tiu en la jarkomenco. Kaj la nombro de akciuloj de la du urboj kreskis de 12 milionoj en 1995 al 21 milionoj en 1996.

Zhang Li estas 39-jara mastro de privata restoracio. Antaŭe li malprofitis de akciado, sed ĉifoje li kaptis la ŝancon. Kiam la bankoj mallevis la rentumojn, li konsciis, ke post nelonge leviĝos la kurzo. Tial li vendis sian restoracion kaj malfermis sian konton en iu valorpapera kompanio. En oktobro tiujare la valoro de liaj akcioj 4-5-oblis. Kiam li vendis siajn akciojn, multaj homoj konkure aĉetis valorpaperojn. Sed en unu semajno decembre en Ŝanhajo kaj Shenzhen malleviĝis la kurzo je 30% kaj 40% respektive.

El tio videblas, ke la ĉinaj akciuloj estas ankoraŭ nespertaj kaj la ĉina akcia merkato nun troviĝas en la komenca periodo. Fakuloj analizis, ke la ĉinaj akciuloj plejparte estas privataj individuoj kaj precipe de la dua duonjaro de 1996 15% de la novaj akciuloj estas senlaboriĝintoj kaj en iuj urboj tia procento atingis 22.8%. Tiuj akciuloj apartenas al la socia tavolo kun malalta enspezo, tial iliaj akcioj estas limigitaj, kaj plie, pro malalta klereco al ili mankas akciaj scioj kaj spertoj.

Nur malmultaj kompanioj partoprenis en la akcia merkato, kaj plie, por tiuj entreprenoj la strukturo de la akciaj proprietoj ne estas racia: 3/4 de la akcioj estas tenataj en la manoj de la ŝtato kaj juraj personecoj, dum nur 1/4 cirkulas en la merkato. Pro ne-

ekonomiaj faktoroj okazis 4-foje en la pasintaj 7 jaroj grandaj leviĝoj kaj malleviĝoj de la kurzo. Ankaŭ iuj kompanioj vendis akciojn sole por kolekti monon kaj cirkuligi kapitalojn, sed ne atentis sian entreprenadon. Ĉio ĉi tio montras, ke la akcia merkato de Ĉinio urĝe bezonas normaliziĝon. Por defendi la interesojn de la akciuloj kaj normaligi la merkaton, en la pasinta jaro la ĉina registaro publikigis serion da politikoj, ekz. malpermesi la bankan monon flui en la akcian merkaton, malpermesi la ŝtatajn entreprenojn kaj aliĝintajn kompaniojn akciadi, ktp., kio plibonigis la investan medion kaj preventis gravajn leviĝojn kaj malleviĝojn de la akcia merkato. Kompreneble, tio estas nur unu flanko. Por normaligi la akcian merkaton de Ĉinio estas bezonata ankaŭ la komuna penado de la akciuloj kaj kontrolaj departementoj de la merkato, krom ŝtataj financaj politikoj kaj koncernaj leĝoj. ■

## KOREKTO

Anstataŭ *ni ĉiuj estas filoj de la Dio legu ni ĉiuj de Di' estas filoj*, p.11, meza kolumno, linioj 24-a kaj 25-a, n-ro 2, 1998; anstataŭ *La materio ĉie konfirmiĝas al koaguliĝinta spirito legu La materio ĉie konfirmiĝas koaguliĝinta spirito*, p.11, meza kolumno, linioj 25-a kaj 26-a, sama numero; kaj anstataŭ *reduondon legu redundon*, p.12, maldekstra kolumno, linio 3-a de malsupre, sama numero. Ni petas pardonon de aŭtoro Artur E. Iltis pro nia fuŝlaboro.

La Red.

## SHAOSHAN, MONTVILAĜO VASTE KONATA

La malgranda montvilaĝo Shaoshan en Hunan-provinco estas vaste konata en Ĉinio, ĉar en ĝi naskiĝis ĉina gvidanto Mao Zedong (1893-1976).

Lia malnova loĝejo kuŝas inter montoj, ĉirkaŭita de pinoj kaj bambuoj. Kiel tipa kamparana loĝejo en suda Ĉinio, ĝi havas lignan strukturon, kun bri-kaj muroj kaj tegmento el nigraj tegoloj. En ĝi lokiĝas litoj, forno, rizpistujo kaj tabloj. Sur muro pendas foto de liaj gepatroj, ordinaraj kamparanoj de Ĉinio.

La 26-an de decembro 1893, en tiu ordinara loĝejo naskiĝis Mao Zedong, kiu poste fariĝis fondinto de la nova Ĉinio. Por rememorigi pri li, oni starigis en Shaoshan lian statuon 10-metre altan en 1993, kiam okazis lia centjariĝo. En Shaoshan estas ankaŭ la Memorhalo de Mao Zedong, Templo de Prapatroj de Mao Zedong kaj Biblioteko Mao Zedong.

21 jarojn post la forpaso de Mao Zedong, multaj ĉinoj ankoraŭ respektas lin kaj vizitas lian malnovan loĝejon. Kaj

### Blanka urso el Kanado



krome, kiel pitoreska loko, Shaoshan allogas en- kaj eksterlandajn turistojn. Profitante la okazon, Shaoshan-anoj funkciigas hotelojn kaj restoraciojn, el kiuj dekoj portas la nomon Mao-familio. Ĉie troveblas vendejoj de sonbendoj de kantoj kaj insignoj pri Mao Zedong. Ĉiujare la vilaĝo akceptas ĉ. 1.5 milionojn da turistoj.

## SUBTERA MARO DE MORTO

Lopnur profunde de la dezerto Taklimakan en Xinjiang (Ŝinĝjang) estas mistera vastaĵo. Ĉ. la 4-a jc ĝi estis ĉirkaŭita de sablo kaj salkrusto. Kaj en 1972 tute sekiĝis la akvo de Lopnur-lago kun areo de pli ol 400 kvadrataj kilometroj.

Ĉinaj geologoj konstatis post esplorado, ke sub Lopnur etendiĝas "subtera maro de morto" kun areo de 1 300 kvadrataj kilometroj. Kiel la Morta Maro, ankaŭ ĝi estas riĉa je silvino. Kun rezervo de 250 milionoj da tunoj da silvino, ĝi estas la plej granda mino de silvino de Ĉinio.

Se vi tuŝas per mano teron du metrojn sub la tersurfaco, via mano kovriĝos de salo. Kaj la temperaturo de la subtera akvo estas ĉ. 11 °C. Malsame ol la Morta Maro,

Lopnur havas sub si akvon fluantan inter grandaj rokfendoj.

Fakuloj konigis, ke antaŭ du milionoj da jaroj Lopnur-lago areis 20 000 kvadratajn kilometrojn. Poste, pro sablo-sedimentado kaj terkrusta movado ĝi pli kaj pli malgrandiĝis. Sekve de forta vaporiĝo, aperis sur ĝia surfaco tavolo da salo, kiu iom post iom malmoliĝis. Eĉ nun la subtera akvo vaporiĝas kiel antaŭe tra poroj de la tersurfaco kaj en la "subteran maron de morto" enfluas akvo pluva kaj neĝa.

La nomita "maro" situas en la nordorienta parto de la antikva Lopnur. Pro abundo da silvino ĝi meritas la nomon "subtera trezorejo".

## BESTOJ EL ALIAJ LANDOJ

En la besta dresado de la Pekina Zoo vivas ĉimpanzo Kako. Post unujara dresado ĝi kapablas bicikli, ludi sur baskulo, salti tra ringo kaj iri sur ŝnuro. Kiam infano testas ĝin per aritmetika demando, ĝi povas trovi ĝustan respondon el multaj ciferslipoj post iom da pensado; kiam la rigardantoj aplaudas ĝin, ĝi dankas ilin per manklakado aŭ gesto de kiso.

Kako aĝas nun ses jarojn. Dujara, ĝi estis donacita de japana zoo. Jam en la 50-aj jaroj alilandaj donacitaj bestoj komencis vivi en la Pekina Zoo. Nun en ĝi vivas ĉ. 20 tiaj bestoj, inter kiuj estas gorilo el Hispanio, ĉimpanzo el Japanio, rinocero el Nepalo, tapiroj el Tajlando, elefanto el Srilankao, marsupiulo el Aŭstralio, urso el Kanado kaj neĝleopardoj el Kirgizstano.

En la Pekina Zoo ili estas aparte flegataj. Srilankaa elefantino, dresite, fariĝis ĉefrolo en prezentado. En la lastaj du jaroj bredistoj trovis, ke ŝi ekhavis la deziron pariĝi, kaj klopodis serĉi kunulon por ŝi. Komence tajlandaj getapiroj ne al kutimiĝis

al vintra klimato kaj dieto de norda Ĉi-nio, sed, zorgate de bredistoj, ilia sanstato pliboniĝis. En la pasintaj 19 jaroj ili naskis ses idojn. Paro da kirgizstanaj neĝleopardoj antaŭe vivis en altlatituda zono. Por ke ili havu bonajn vivkondiĉojn en la zoo, la bredistoj malaltigis la temperaturon de la medio kaj manĝigis al ili vivantajn bestetojn. En la pasinta jaro la femala estis triafoje naskonta. Ĉar tiutempe al ŝi plaĉis kvieteco, la bredistoj apartigis la virseksan disde ŝi unu monaton antaŭ ŝia akuŝo kaj observis ŝian vivon per fermcirkvita televido.

Petite, la Pekina Zoo prezentis al la Internacia Instituto pri Neĝleopardoj disertacion pri bredado de neĝleopardoj, kiun alte taksas fakuloj.

## PLEJ FRUA UTILIGO DE SUNENERGIO EN ĈINIO

Antaŭ 2 700 jaroj ĉinoj komencis utiligi sunenergion. Jam en Zhou-dinastio (ĉ. la 11-a jc - 256 a. K.) servis ŝtatoficistoj, kiuj respondecis ekskluzive pri bronzaj sunenergiaj kondensoroj. Estis elterigita tia kondensoro en tombo (ĉ. 1066-476 a.K.) en Henan, Ĉinio. Ĝi estas atesto de primitiva utiligo de sunenergia en Ĉinio.

En la jaroj 1875-1908, regperiodo de la Qing-dinastia imperiestro Guangxu, vivis en Sichuan erudiciulo Xiao Kaitai, kiu plej frue komencis studi pri sunenergia en Ĉinio. Lia malgranda kondensoro estis uzata por kuiri, baki kaj rosti manĝaĵon per sunenergia, kiu ne odoris fume. Poste, li ekfunkciigis restoracion kaj rostis anason antaŭ ĝi per sunenergia kolektita de kondensoro, kio estis multe admirita.

Lia ekipaĵo por rosti anason estas rigardata kiel la plej frua sunenergia forno de Ĉinio. Ĝi, en formo de disvolvita ombrello inversigita, funkciis same kiel nuntempa sunenergia forno.

## Kolekto 2000

Okaze de la 10-jariĝo de **EUROKKA** kaj kunlaborado kadre de **Kampanjo 2000, VINILKOSMO** (la diskeldonejo de **EUROKKA**) lanĉas la projekton **Kolekto 2000**.

Temas pri kompaktdiska kolekto, kiu startos ekde printempo de 1998 ĝis la jaro 2000 aŭ 2002.

La celo estas aperigi dum tiu periodo serion de minimume dek 6/8-titolaj KD-oj el diversaj Esp-artistoj. La unua KD planita; tiu de "**JoMo**" devus aperi en aprilo/majo 98 por festi la 10-jariĝon de **EUROKKA**. La dua kun kantoj de "**Brassens**" en Esperanto interpretitaj de "**Jacques Yvart**" estus preta por la 83-a UK en Montpeliero.

**EUROKKA/VINILKOSMO** serĉas monsubtenantojn, mecenatojn kaj partnerojn por realigi tiun projekton, kies celo estas plikreskigi kaj pliriĉigi Esp-muzikkulturon surbaze de arta, profesia kaj teknika kvalito; vi povas fariĝi unu el tiuj gravaj subtenantoj.

Pere de **Kolekto 2000 UROKKA** volas ankaŭ substreki, ke vivanta Esperanto-kulturo kiel muziko estas unu el la plej gravaj elmontraj de ekzisto kaj realo de Esperanto por kaj esp-istoj kaj neesp-istoj.

Ni alvokas la Esp-artistojn partopreni la projekton, kaj ankaŭ la esp-istojn, kiuj ŝatus subteni la projekton abonante ekde nun **Kolekton 2000**.

Por pliaj informoj kaj klarigoj kontaktu **VINILKOSMO**-n ĉe: **EUROKKA** (Esperanto-Rok-Asocio), FR-31450 Donneville, Francio, tel/faks: +33 561 81 95 65

## Gratulo al la 90-jariĝo de H. Nischwitz

La 18-an de novembro 1997 s-ano Heinrich Nischwitz, emerita bankoficisto en Bensheim de Germanio, fariĝis 90-jara. Li povas retrorigardi al sia 75-jara esperantisteco. Li naskiĝis en Mannheim, kie 15-jara li eklernis memstare Esperanton kaj aliĝis al la loka grupo de Germana Esperanto-Asocio (GEA), kies plej juna grupestro li fariĝis. En 1926 li iniciatis la fondon de Suda Ligo, laboruniĝo de esperantistoj en Badeno kaj Virtembergo. Al la estraro de GEA li apartenis de 1954 ĝis 1983: kiel vicprezidanto de 1954 ĝis 1971 kaj kiel trezoristo de 1966 ĝis 1983. Pentekoston 1983, GEA elektis lin honora membro.



Unuafoje li vizitis Universalan Kongreson en Antverpeno en 1928, kaj lia lasta kongreso estis tiu en Vieno en 1992. Poste li rimarkis la perdon de forto por tiaj entreprenoj kaj li devis grave redukti siajn rektajn kontaktojn, dediĉante sin ĉefe al legado de la granda kvanto da abonitaj Esp-gazetoj, inter kiuj ludas altan rolon la gazeto EPĈ, kies fervora leganto li estas de tre multaj jaroj.



# Sanprotekto de maljunuloj

**P**RO maljuniĝo la organoj de la homoj iom post iom debiliĝas kaj ilia energio malvigliĝas, sekve de tio, la maljunuloj estas facile atakitaj de malsanoj, tial bonfarto kaj longviveco estas ilia komuna deziro. La ĉin-medicinaj fakuloj resumis la sanprotektajn metodojn de la maljunuloj en tri partojn.

Unue, la maljunuloj devas multe atenti influon de la ŝanĝiĝo de la klimato kaj ekstera medio sur la homa sano. Oni devas observi la regulojn pri ĉiutagaj vivo, laboro, ripozo, en- kaj ellitiĝo kaj preni manĝaĵojn en difinitaj horoj, por ke la biologia horloĝo bone funkcii kaj senileco malfruiĝu.

Due, la maljunuloj devas doni sufiĉan atenton al la korpo kaj spirito por esti kaj sanaj kaj viglaj. Laŭ la ĉin-medicina teorio oni devas unue protekti la vitalan energion de la stomako, ĉar la sanaj lieno kaj stomako garantias transportadon de la nutroj al diversaj organoj por doni fiziologian funkcion kaj teni la homan sanon. Por reguligi la vitalan energion de la stomako oni devas doni sufiĉan atenton al la sanprotekto per manĝaĵoj kaj medikamentoj. Oni devas ankaŭ racie uzi sian cerbon, por ke ĝi ne laciĝu, kaj krome, oni devas fari la spiritan aktivadon harmonia kaj liberigi sin el ĉia malbo-

na humoro.

Kaj trie, oni devas reguligi la visceran funkcion kaj glatigi la *ĝinglŭo*-vojojn (vojoj por cirkuligi la vitalan energion). Tio estas grava al la homa vivo kaj ankaŭ al la homa sano. Surbaze de la teorio de *jin* kaj *jang* oni devas doni la bezonatajn al la korpo, forigi la superfluaĵojn por ĝi kaj glatigi la vojojn por facila irado de la vitala energio kaj likvidado de la patogenaj faktoroj.

Pro maljuniĝo oni facile suferas de morno, malglata cirkulado de la vitala energio kaj sango, malkompakto de la ostoj. Pro tio oni estas facile atakata de apopleksio, artika malsano, aŭtismo k.a. Tial, kontraŭ ili oni devas preni konvenajn rimedojn kiel eble plej frue.

Apopleksio ofte okazas ĉe maljunuloj. Por ĝin preventi kaj kuraci oni devas deteni sin de ĉia malbona humoro, teni sangpremon sur modera nivelo, fari sportojn konvenaj por la sano kaj eviti grasiĝon. La manĝaĵoj devas esti hipograsaj, hipokaloriaj kaj hiposalaj, konsistantaj el bonkvalitaj proteinoj, vitaminoj, celulozoj kaj mikroelementoj. Oni devas ĝustatempe kuraci koronarian kormalsanon, diabeton, pulmonon, insuficiencon de la renoj kaj hepato, renan kaj galan liti-azojn, inflamon de la urina sistemo ktp.

Artikaj malsanoj kaŭziĝas de degenero de la artikoj pro malju-

niĝo. Por preventi kaj kuraci la lumba-vertebrajn malsanojn oni antaŭ ĉio devas atenti sian dieton kaj eviti korpulentecon. La lumboj ne estu atakataj de malvarmo. Oni ne devas teni sin en unu sama pozo longtempe. Oni devas ofte ekzerci siajn lumbojn kaj fari memmasaĝon tiamaniere: sidi rekte, malligi la zonon, froti la manojn ĝis varmiĝo, meti ilin ĉe la talion kaj froti ĝin de supre malsupren ĝis varmiĝo. Por eviti ĉian genuan lezon kaj laciĝon oni ne devas fari longan promenadon, nek longan laŭŝtuparan iradon nek drastan sporton. Por pliigi stabilecon de la genuoj oni povas levi la krurojn, kuŝante surdorse, fleksi kaj malfleksi la genuojn. Oni povas ankaŭ mem masaĝi la genuojn: per la palpa flanko de la fingroj froti la du flankojn de la pateloj kaj per la manplatoj vertikale premi la patelojn. Oni faru tion 60 fojojn ĉiuminute, ne tro forte. Ĉiu ekzerco daŭras 3-5 minutojn.

Ankaŭ la malbona humoro estas malutila al la homa sano. Pro tio la maljunuloj devas eviti ĉian spiritan eksciton, spici sian vivon per muziko, fiŝhokado ktp kaj partopreni konvenajn sociajn aktivadojn. Krom tio, ili devas ankaŭ bone uzi sian cerbon, por ke ĝi laboru vigle. Tio estas utila al la sano fizika kaj spirita de la maljunuloj. ■

## Suzhou-a brodaĵo: kato kaj manto

Suzhou-a brodaĵo kun 2000-jara historio estas unu el la kvar famaj brodaĵoj en Ĉinio. Suzhou situas ĉe la suda bordo de Yangzi-rivero, kie kreskas silkraŭpoj. La broda metiarto prosperas en Suzhou jam delonge. En la lastaj dekoj da jaroj la brodistoj formis la trajtojn de Suzhou-a brodaĵo: skizo konciza, temo okulfrapa, figuro viveca kaj brodado delikata.

La Suzhou-a brodaĵo kun delikataj kudreroj kaj elegantaj koloroj estas tre taŭga ornamaĵo. Nun estas pli ol 40 manieroj de farado kun ecoj ebena, brila, orda, maldika, glata, densa... La metiartistoj kreis duflankan brodaĵon, kiu estas egale bela sur ambaŭ flankoj. "Kato kaj manto" estas tre valora duflanka Suzhou-a brodaĵo.





Urbeto Moret  
sur Loing  
apud Parizo

**RAYMONDE  
PERAULT**  
(Francio)



Kastelo  
Herberstein

**HERBERT KAMPL**  
(Aŭstrio)

ISSN 0032-4361

